

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 1

[Vol. 1] (1936/37)

Oktobero 1936

Eldonanto :  
Internacia Esperanto-Ligo,  
142, High Holborn,  
London W.C.1.

Redaktoro :  
Teo Jung.

Protokolo de Kunsido de  
UEA-Komitato

en Wien - 15 Aŭg. 1936

## Universala Esperanto-Asocio

### LA LASTAJ OKAZINTAĴOJ.

Esperantistoj sendube bone memoros, ke la voĉdonado de la delegitoj pri la ŝanĝo de la statuto kaj sekve la translokigo de la oficejo montris, ke 80 % el tiuj, kiuj voĉdonis, aprobis la ŝanĝon. Pro tio, ĉiu atendis baldaŭan solvon de la problemoj kaj komencon de la vere necesa laboro de la centra oficejo.

Bedaŭrinde la svisaj protestintoj rifuzis akcepti la rezulton kaj ne ĉesigis la leĝan proceson, kiu malhelpas la translokigon kaj aldonas altajn kostojn al la jam suferanta budĝeto de nia organizo. Por pravigi tiun agon, ili prezentas ses kritikojn: — Oni sendis **aerpoŝte** bultenojn al kelkaj malproksimaj landoj; la cirkulero al la delegitoj estis subskribita de la Prezidanto, sed ne de la Direktoro, ktp. Sed la unua kritiko estis, ke la Prezidanto ne formale voĉdonigis la Komitaton pri okazigo de la delegita voĉdonado. Tio estas vera, ĉar ekzistis jam antaŭe voĉdono de la Komitato por translokigo al Londono. Neniu bonvola homo pretendos, ke estis necese revoĉdonigi ĝin kaj malŝpari ankoraŭ kelkajn monatojn kun la koncernaj altaj elspezoj por nur **formala** aprobo de la delegita voĉdonado pri aliigo de la statuto, kiu estas la sekvo de la aprobo jam donita. Kaj kion tia dua voĉdono de la komitato estus ŝanĝinta en la rezultato?

Post la 4a de Julio la Prezidanto traktis kun la protestintoj, kaj dum la unuaj tagoj de la Viena Kongreso ŝajne estis espero pri akordiĝo. Je la 14a de Aŭgusto li ricevis leteron de S-ro Bouvier, kiu malaperigis tiun esperon kaj montris, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino. Laŭ la kalkulo de la Komitato tiu certe daŭrus minimume sep monatojn, kaj, laŭ la advokato, eĉ pli ol unu jaron. U.E.A. ne plu posedas sufiĉe da mono por elteni dum tiom da tempo, ĉar intertempe ĝi povus preskaŭ nenion fari. La protestintoj per leĝa proceso malebligas la funkciadon en Londono, kaj ankaŭ malpermesas, ke la elektita Direktoro laboru en Genevo, dirante ke li estis elektita nur por Londono. Fakte, do, tio signifas la morton de U.E.A. Pro tio, la komitatanoj en Vieno, kun granda bedaŭro, unuanime akceptis la ĉi-kunan rezolucion.

Post la kongreso la Prezidanto vizitis S-ron Stettler, kiu diris, ke li tute ne enmiksiĝis en la ĝeneva proceso. Li vizitis S-ron Bouvier, kiu promesis paroli kun siaj amikoj, kaj doni respondon je la fino de Aŭgusto. La respondo alvenis, kaj denove montris, ke ili ne volas ĉesigi la proceson.

Tio montras, ke kelkaj malmultaj personoj tute ne volas akcepti la deziron de la granda plimulto, sed volas devigi la komitaton resti en Genevo, kvankam ĝi bone scias, ke tio estas finance neebla. La komitatanoj, opiniante ke forta internacia organizo, kiu volas kaj povas labori en la intereso de la movado, estas pli grava ol iu nomo, decidis starigi novan organizon sub la nomo « Internacia Esperanto-Ligo ». Ili atendas la subtenon de ĉiu Esperantisto, kiu deziras unuecon kaj bonan laboron.

**Ceestis:** La Prezidanto (Gen. L. Bastien), P. W. Baas (Nederlando), O. Bujwid (Polujo), I. R. G. Isbrücker (Nederlando), ...neers (Belgujo), E. Malmgren (Svedujo), ...ver (Britujo), P. Petit (Francujo), ... (Usono).

La ĉeestantaj komitatanoj de U.E.A., post lego —

1. de la letero de S-ro Bouvier, de la 30-a de Julio 1936, kiu antaŭvidigas esperon de akordiĝo pri la nuna proceso,

2. de la letero de S-ro Bouvier, de la 13-a de Aŭgusto 1936, kiu malaperigas tiun esperon kaj montras, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino,

konsiderante, ke tiu decido de la protestintoj malhelpas la translokigon de la oficejo de U. E. A. al Londono dum pluraj monatoj; ke tio igas neebla la komencon de la laboro por la venonta jaro kaj eĉ ĉiun seriozan taskon dum pluraj monatoj; ke en la nunaj cirkonstancoj tio signifas la morton de U.E.A.,

komisias sian Prezidanton por fari tuj ĉe S-ro Stettler kaj ĉe la protestintoj lastan klopodon, por ke tiuj ĉi rezigu sian agadon kaj por eviti la baldaŭ timotan katastrofon;

En okazo de malsukceso aŭ de netuja sukceso,

decidas, ke la Landaj Asocioj, respektive la Komitatanoj, estos petataj, ke ili tuj eksigu el U.E.A., kaj fondu novan Asocion sidantan en Londono; ne akceptas la eksigon de S-ro Goldsmith kiel Direktoro; kaj decidas, ke li estos proponata kiel Ĝenerala Sekretario de la nova Asocio;

komisias sian Prezidanton kaj sian Direktoron por pristudi, post konsiliĝo kun juristoj, la demandojn, kiujn sekvigas tiu rezolucio: provizora statuto, forlaso de la posedaĵo de U.E.A., ktp.

Pri la nuna proceso:

En la dirita okazo de malsukceso, decidas, ke la proceso, kiu ne plu interresos la novan Asocion, estos forlasita, post konsiliĝo kun juristoj.

# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: 142, High Holborn, London, W.C.1, Anglujo.

## Oficiala Informilo

N-ro 1. 19 Septembro 1936.

### Starigo.

La artikoloj aliloke sufiĉe detale klarigas la starigon de nia Asocio. Estas bedaŭrinde, ke la agado de kelkaj malmultaj samideanoj devigas tiun paŝon; sed ĝi estis nepre necesa, se ni deziras konservi internacian organizon, kiu laboros por la disvastigo de nia movado, kaj liveros al la membroj tion, kion ili rajtas atendi. La oficejo jam funkcias, kaj jen la unuaj informoj.

### Kotizoj 1937.

Tabelo pri la kotizoj kaj pri la Premioj por Subtenantoj troviĝas en aparta loko. Bonvolu noti, ke tiuj, kiuj nun pagas la kotizojn MA kaj MS, ricevos *Esperanto Internacia* ĝis la fino de 1937. Ĝi aperas ĉiumonate ĉirkaŭ la 1-a de la monato.

### Oficialaj Gazetoj.

Laŭ interkonsento farita kun S-ro T. Jung, *Heroldo de Esperanto (Esperanto Triumfonta)* kaj *Esperanto Internacia* estas oficialaj organoj de la Ligo. La kotiz-tabelo klarigas, kiamaniere oni povas ricevi aŭ unu aŭ la alian; Membro-Subtenanto, kiu elektos Premion A, ricevos ambaŭ, sed *Heroldo* NUR de Januaro 1937. Post la fino de 1936, *Esperanto Internacia* povos esti abonata nur ĉe IEL.

### Landaj Asocioj.

Brita Esperantista Asocio jam aliĝis al IEL. Ni atendas baldaŭan aliĝon de preskaŭ ĉiu Landa Asocio.

### Dumvivaj Membroj.

Konsentis esti Dumvivaj Membroj:

- G. D. Buchanan, Glasgovo;
- J. F. Dinslage, Londono.

### Ĉefdelegito.

Interkonsente kun la Brita Asocio, la Ĉefdelegito por Britujo estas:

Fred Wadham, Holmbury, Woodcote Hurst, Epsom, Surrey.

### Delegitoj.

La unua listo:

#### Aŭstrujo

Wien. — (FD: Studentaj Aferoj) M. R. Frey, Alserstr. 63a, Wien VIII.

#### Britujo

Leicester. — D: Noel Wooding, 15, Andover Street.

Londono (V.D.E.11). — H. W. Holmes, 38, Fillebrook Road.

(V.D.N.22). — F-ino R. Davey, 89, Moselle Avenue.

(FD.Maklerado). — V. Grimmitt, 14, Clarendon Rise.

Oxford. — D: F. H. Messer, 16, Winchester Road.

Southend-on-Sea. — D: A. J. Shaw, 6, Ramuz Drive, Westcliff-on-Sea.

Thorpe Bay. — D: R. Murray, Dunrobin, Northumberland Crescent.

#### Hindujo

Santiniketan (Bengal). — D: Lakshmiswar Sinha.

Longa listo troviĝas en *Informilo N-ro 2*.

### Nia hejmo.

Du tre malavaraĵaj membroj ĵus donacis al nia ligo por ĝia sidejo belegan domon apud Lon-

## KOTIZOJ 1937

*Membro kun Jarlibro* (MJ) ricevas membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron.

*Membro-Abonanto* (MA) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton dum la jaro.

*Membro-Abonanto-Heroldo* (MAH) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la semajnan gazeton *Heroldo de Esperanto* dum la jaro.

*Membro-Subtenanto* (MS) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton; krom tio li rajtas ricevi

premion.

No'o: La oficialaj gazetoj estas *ESPERANTO INTERNACIA* monate, kaj *HEROLDO DE ESPERANTO* semajne.

En la landoj, kies Landa Asocio aligas siajn membrojn al IEL, estas alpagota la respektiva kotizo de la Landa Organizo.

Oni povas pagi kotizojn al Loka Delegito de IEL, al la Ĉefdelegito, al Landa Asocio, se tiu aliĝis al IEL, aŭ al la Centra Oficejo, Internacia Esperanto-Ligo, 142, High Holborn, London W.C. 1, Anglujo.

LANDO	MONO	MJ	MA	MAH	MS	Entrepreno	Jarlibro 1-paĝa anonco
Argentino	pesoj	3.00	7.5	15.0	20.0	7.5	30.0
Aŭstralio	ŝilingoj	5/—	12/6	24/—	30/—	12/6	50/—
Aŭstrujo	ŝilingoj	5 00	12.50	24.0	40.0	12.50	60.0
Belgujo	frankoj	22.00	50.0	130.0	200.0	50.0	300.0
Brazilo	milreis	20.00	50.0	90.0	120.0	50.0	200.0
*Britujo	ŝilingoj	9/—	15/—	24/—	30/—	10/—	50/—
Bulgarujo	levoj	100.0	250.0	475.0	750.0	250.0	1250.0
Ĉeĥoslovakujo	kronoj	25.0	60.0	120.0	160.0	60.0	250.0
Ĉilio	pesoj	25.0	65.0	125.0	180.0	65.0	350.0
Danujo	kr.	5.0	12.0	22.0	30.0	12.0	50.0
Estonujo	kr.	4.0	9.0	17.0	25.0	9.0	40.0
Finlando	fmk.	50.0	125.0	220.0	325.0	125.0	500.0
Francujo & Kolonioj	frankoj	12.50	35.0	70.0	110.0	35.0	200.0
Grekujo	dr.	100.0	250.0	525.0	750.0	250.0	1250.0
Hispanujo	pesetoj	8.0	20.0	40.0	60.0	20.0	80.0
Hungarujo	pengoj	5.0	12.50	25.0	35.0	12.50	50.0
Ĥinujo	dolaroj	3.0	8.0	16.0	20.0	8.0	40.0
Italujo	liroj	12.0	30.0	65.0	90.0	30.0	140.0
Japanujo	jenoj	4.0	10.0	18.0	25.0	10.0	50.0
Jugoslavujo	dinaroj	40.0	120.0	220.0	300.0	120.0	500.0
Kanado	dolaroj	1.0	2.50	5.0	7.0	2.50	12.0
Kubo	dolaroj	1.0	2.50	5.0	7.0	2.50	12.0
Latvujo	lat.	4.0	9.0	17.0	25.0	10.0	50.0
Litovujo	lid.	8.0	20.0	40.0	50.0	20.0	100.0
Nederlando	gld.	2.0	5.0	7.50	12.50	5.0	25.0
Norvegujo	kr.	4.0	11.0	20.0	30.0	11.0	50.0
Novzelando	ŝilingoj	5/—	12/6	24/—	30/—	12/6	60/—
Perujo	zlotoj	6.0	15.0	28.0	45.0	15.0	75.0
Portugalujo	eskudoj	20.0	50.0	110.0	175.0	50.0	250.0
Romanujo	leoj	120.0	300.0	675.0	800.0	300.0	1500.0
Svedujo	kronoj	4.0	11.0	20.0	30.0	11.0	50.0
Svisujo	frankoj	4.0	9.0	16.0	25.0	10.0	50.0
Turkujo	piastr.	125.0	325.0	625.0	900.0	325.0	1500.0
Urugvajo	pesoj	1.5	3.5	6.50	10.0	3.50	17.0
Usono	dolaroj	1.0	2.50	5.0	7.0	2.50	12.50

(\*) indikas ke la kotizo enhavas ankaŭ la kotizon de la Landa Asocio.

dono. Ĉiu Esperantisto certe aliĝos al la dank-esprimo kiun ni sendis al ili. Oni nun pretigas la domon, kaj kredeble jam en Decembro ni povos eniri ĝin. Ni anoncos la detalojn ĝustatempe, kaj espereble baldaŭ povos montri al vi foton, per kiu vi vidos la belecon de la domo kaj ĝardeno.

### Librolisto.

Responde al multaj petoj, ni pretigis libroliston, kaj sendos ekzempleron al ĉiu, kiu deziras ricevi ĝin.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Unueco

estas la fundamento de forta movado. La Esperanto-organizo bezonas ĝin pli necese ol iu alia movado. — Do, gesamideanoj tutmondaj

**laboru interkonsente!!**

## Listo de Premioj por Membro-Subtenanto, 1937

Listo de Premioj por Membro-Subtenanto, 1937  
Ĉiu MS rajtas elekti unu el la sekvantaj premioj, mendotaj laŭ la koncerna litero.

- A. HEROLDO DE ESPERANTO dum unu jaro. Tio signifas, ke MS, kiu elektas tiun premion, ricevos la gazeton *Esperanto Internacia* monate, kaj *Heroldo de Esperanto*, semajne.
- B. TRI volumoj el Populara Esperanto-Biblioteko, laŭ la sekvanta listo:
  1. LA VIRO EL FRANCUJO. Ivans (W. Versteeg Graftdijk)
  2. QUO VADIS (Vol. I.) H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)
  3. QUO VADIS (Vol. II.) H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)
  4. SI. Rider Haggard (G. J. Degenkamp)
  5. FANNY. Edna Ferber (Berno Fabo)
  6. RICA KAJ SEN MONO. E. P. Oppenheim (F. E. Wadham)
  7. LA ORA STUPARO. E.P. Oppenheim (Romford Esp. Societo)
  8. LUNO DE IZRAEL. Rider Haggard (Payson kaj Butler)
  9. PINOKJO. C. Colodi (M. Marchesi)
  10. LA DORMANTO VEKIGAS. H. G. Wells (A. F. Milward)
  11. PETROLO (Vol. I) Upton Sinclair (W. Bailey)
  12. PETROLO (Vol. II) Upton Sinclair (W. Bailey)
  13. LA AVENTUROJ DE MARTENO DRAKE. G. Norway (W. Severn)

Ĉiu volumo estas tole-bindita. Indiku la elekton laŭ la jena maniero: B 1—4—7.
- C. HINDO RIGARDAS SVEDLANDON. — Bind. — SIVAGI, BENGALAJ FABELOJ, KAJ ĈIO RESTAS PENSO SED NE FARO. Ĉiuj kvar libroj originale verkitaj de L. Sinha.
- D. LA HOMAĴ RASOJ DE LA MONDO, R.

- Nordenstreng; JUNEKO KAJ AMO, E. S. Payson; KOMPATINDA KLEM, J. Merchant; POR RECENZO, K. R. C. Sturmer. Ĉiuj originalaj verkoj, kaj tole binditaj.
- E. ROMANO PRI AFRIKA BIENO, de Olive Schreiner; PRI LA ORIGINO DE L'HOMO, Sir A. Keith; MINIATUROJ, poemoj de G. Nash. Ĉiuj tole binditaj.
- F. LA VIVO DE NIA SINJORO JESUO, Ch. Dickens. Belega luksa eldono, kaj krome, PROGRESADO KAJ LA PASINTECO, G. F. Wates.
- G. GØSTA BERLING, Selma Lagerlof; BELA JOE, Marshall Saunders. Ambaŭ binditaj.
- H. TRA SOVAGA KAMCATKO, Sten Bergman; STRANGA HEREDAJO, Luyken. Ambaŭ binditaj.
- I. SVEDA ANTOLOGIO, Redaktita de Sam Jansson. 432 paĝoj, luksa papero, bindita.
- J. ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO, O. Ginz kaj S. Kamaryt. Broŝurita ekzemplero.
- K. HUNGARA ANTOLOGIO, K. Kalocsay. Broŝurita ekzemplero.
- L. HURA! VIKTIMOJ. Ambaŭ verkoj de Julio Baghy.
- M. JANE EYRE, C. Brönte ;LILIO, Sinnotte, kaj LA KARAVANO, Hauff. Ĉiuj tri libroj binditaj.
- N. LA LEONO DE FLANDRUJO, H. Conscience (bind.); RUMANA BONHUMORO, Firu kaj Pragano.
- O. ODUSSEIAS DE HOMEROS, W. J. A. Manders (bind.); OK NOVELOJ, Arnold Bennett; FACILA LEGOLIBRO, K. R. C. Sturmer.
- P. PALLIETER, F. Timmermans (bind.); BELA JOE, Marshall Saunders (bind.); OK NOVELOJ, Arnold Bennett.
- Q. ROMANO DE SAN MICHELE, Axel Munthe (bind.); TRI ANGLOJ ALLANDE, John Merchant.

## Atentigo !

Pro nova dekreto kontraŭ Esperanto en Germanujo, postulanta la dissolvigon de la artlingvaj organizoj, ankaŭ HEROLDO DE ESPERANTO kaj ĝia monata eldono, la MONATA HEROLDO, devis ĉesigi sian aperadon. Anstataŭ la semajna eldono ekaperis en Rotterdam nova gazeto sub la titolo ESPERANTO TRIUMFONTO, eldonita de Nederlanda Esperanto-Centro kaj redaktita de s-ro A. C. van Ingen. Tiu gazeto tamen estis nur provizora eldonaĵo, komencita por ke la Esperantistaro ne restu tro longe sen sia kutima semajna informilo. De post la 1-a de Oktobro denove aperos HEROLDO DE ESPERANTO, komisie eldonata de Belga Esperanto-Instituto en Antwerpen; sed la redakcio kaj administracio restos en la manoj de ĝia fondinto kaj posedanto s-ro Teo Jung, nun restanta en Den Haag, Nederlando. Anstataŭ la MONATA HEROLDO aperas nun la revuo ESPERANTO INTERNACIO, eldonata de Internacia Esperanto-Ligo sed redaktata, same kiel la semajna gazeto, de s-ro Teo Jung. Ambaŭ eldonoj, la semajna HEROLDO DE ESPERANTO kaj la monata ESPERANTO INTERNACIA, estas oficialaj organoj de IEL.

La antaŭaj abonantoj de MONATA HEROLDO ricevos ĝis la fino de la nuna jaro kiel kompenso la revuon ESPERANTO INTERNACIA. Poste, ĉi tiu monata eldono estos rezervita ekskluzive por la membroj de Internacia Esperanto-Ligo.

## Pola Trafikministerio favora al Esperanto

Pola Trafikministerio, turisma fako, okaze de la 29-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1937, decidis eldoni ĉiujn aperontajn broŝurojn kaj prospektojn en Esperanto.

Esperanta Sekcio ĉe Pola Touring-Klubo, fondita la 30-an de oktobro 1933, transformiĝis la 28-an de marto 1935 je Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo (STEP).

STEP, kies celo estas propagando de pola turismo pere de Esperanto, donas al eksterlandanoj necesajn informojn pri pola turismo, servas per informoj kaj laŭebla helpo al turistoj, dezirantaj viziti polan landon, kaj al sportuloj, alvenantaj Polujon por partopreni diversajn sportkonkurojn.

Jam dum la I-a Ĝenerala Kunveno de STEP, okazinta la 21-an de junio 1935, oni sciigis la ĉeestintojn, ke la Estraro de STEP estas en kontakto kun Turisma Fako de Trafikministerio kaj ke verŝajne la Ministerio okaze de la 29-a Kongreso de Esperanto aperigos gvidlibron tra Polujo en Esperanta lingvo.

Dank' al klopodoj de la prezidanto de STEP, Bronislaw Wyszynski, konsilanto de Trafikministerio, Turisma Fako, sukcesis favorigi la Ministerion al Esperanto: Pola Trafikministerio, Turisma Fako, konsiderinte la gravecon de internacia lingvo Esperanto kaj la 29-an Jubilean Universalan Kongreson de Esperanto, okazontan en Varsovio en 1937, eldonos nun broŝurojn kaj prospektojn en 12 lingvoj, kaj en ili havos lokon ankaŭ Esperanto. La broŝuroj estas jam tradukataj. Pro la 29-a Universala Kongreso estas preparata speciala ciklo de diversaj broŝuroj kaj flugfolioj. Ili aperos baldaŭ.

**Aligu**  
kiel aktiva membro  
al  
**Internacia**  
**Esperanto-**  
**Ligo**



# Nia Dudekoka en Vieno



PREZ. REG. KONS.  
HUGO STEINER

RĪCATUREN-KABINETT KÓRÁ'S

Vieno, 13/8/1936.

Estas jaŭdo; la kongreso forflugis en diversaj ekskursoj kaj mem ne partoprenante mi fine havas kelkajn trankvilajn horojn por ellabori la krudmaterialon kiun mia skribmaŝino amasigis en la lastaj noktoj. Jes, dum kongreso la tempo ŝajnas ne ekzisti, ĉar oni neniam havas. La aranĝoj sinsekvas seninterrompe kaj ankaŭ en Vieno la kongreso estas tre malenuiga. Ĝis nun ni povas diri, ke la kongreso bone sukcesis kaj la organizo ne estis tiel malbona ke ĝi ĝenis. Pri la rezulto de la laboroj de UEA hodiaŭ ankoraŭ nenio estas direbla, cetere estos direktoro Goldsmith mem, kiu raportos en tiu ĵurnalo pri tiuj laboroj. La kongreso havas 956 anojn laŭ la kongreslibro, sed fakte nun estas proksimume 1100. Do la kongreso ne estas tre granda kaj oni bedaŭras, ke multaj konataj samideanoj ne estas ĉi tie kaj ke tuta lando kun multaj fervoraj esperantistoj pro la malbonvolo de sia registaro ne estas reprezentata. Aliflanke, por la kongresaj aranĝoj la ne tro granda nombro de partoprenantoj estas pli avantaĝa. La honora kongresa komitato sub la honora prezido de federacia kanceliero de Aŭstrio d-ro Kurt von Schuschnigg plenigas tutan paĝon en la kongreslibro. La kongreso fakte havas la apogon de la registaro. La Loka Kongresa Komitato konsistas el

kortega konsilisto Hugo Steiner, prezidento kaj d-ro F. Uebelhör, d-ro A. Engländer, N. Hovorka, d-ro E. Pfeffer, E. Werner kaj d-ro F. Zehden.

## LA ALVENO EN VIENO.

Dum sabato, la 8-an de aŭgusto, la kongresanoj alvenis de ĉiuj flankoj, parte kun la turisma aranĝo Tra Aŭstrio, parte en karavanoj, parte private. Sur la kajo de la stacidomo atendis nin verda flago, policistoj kun metalaj tabuloj kun la surskribo ESPERANTO helpis nin trovi la vojon. La kongresanojn ni jam ricevis en la stacidomo kaj vere tiu servo tre bone funkciis. La samideanoj, kiuj jam ricevis sian kuponaron tuj povis ekserĉi siajn hotelojn. Pro iu mistera kaŭzo mi ne estis ricevinta la mian kaj devis veturi al la kongresejo. Estis posttagmeze kaj la samideanoj jam svarmis kiel abeloj en la halo de Neue Burg, nia pompa kongresejo en la mezo de la urbo. Kongreseja poŝtofiĉejo, kiu disponis pri propra ganda stampo kun surskribo 28-a Universala Esperanto Kongreso jam laboregis. La eldonejo de la teatraj biletoj estis ĉirkaŭata de rondo de kongresanoj kaj la pordo de la kongresoficejo estis tute barita de homamaso. Kune kun aliaj samsortanoj mi staris tie dum du horoj, ĝis mi povis eniri. Kongresestro Steiner mem sidis en la oficejo kaj pro nervozeco apenaŭ plu sciis kie li havis la kapon. Ho, ekzistas komplikaj kazoj kaj la organizo ne sukcesis solvi ĉiujn. Ankoraŭ sabate vespere multaj kongresanoj ne sciis kie loĝi. Feliĉe mi havis bonŝancon tuj ricevi miajn hotelkuponojn, kiam mi fine penetris en la oficejon, sed ĉar la LKK ne konsideris necese aldoni planon de Vieno al la Kongresanoj, mi tute perdis la vojon kaj verŝajne mi ankoraŭ hodiaŭ vagadus tra la stratoj de Vieno, se mi ne germane estus scipovinta demandi pri la vojo. Cetere la vienanoj estas tre afablaj homoj: kaj la neesperantistoj inter ili kaj niaj samideanoj ĉiam estis tre helpemaj kaj bonvolemaj.

La kongresanojn ni ricevis en papersaketo, kiu tute elŝvelis pro la multa enhavaĵo. Ĝi enhavis multajn belajn prospektojn, precipe pri Aŭstrio, dikan kongreslibron kaj la insignon. La insigno konsistas el bronco kaj portas la saman engravajon, kiun ni jam konas de la kongresa klišo. Ĝi estas tre plaĉa. La kongreslibro estas tre bela, la sola riproĉo farebla estas ke ĝi estas tro grandformata. Oni nepre devas povi porti la kongreslibron en la poŝo; sed ĉiuj poŝoj

estas tro malgrandaj por ĝi kaj por faldado ĝi estas tro dika. Ĝi estas tre bele presita kaj enhavas multajn bildojn de LKK kaj Honora Komitato. Krom la programo kaj la adresaro de la kongresanoj ĝi enhavas praktikan Esperantogerman-lingvan vortareton kaj la resumon de la Blanka Ĉevalet' kun kelkaj el ĝiaj kantoj. La kongresgazeto estas la konata aŭstra ĵurnalo Reichspost, kiu ĉiutage enhavas tutan aŭ duonan paĝon en Esperanto. Sed ĝi tute ne kontentigas. Se mi rememoras la grandegan bonege redaktitan Esperantopaĝon de la stockholma ĵurnalo Dagens Nyheter, mi bedaŭras ke ni ne havas tiujn lertajn ĵurnalistojn ĉi tie. Ili povus fari bonajn raportojn, trafajn artikolojn, interesajn intervjuojn kaj belajn fotografiojn. Estas bone kunigi la kongresgazeton kun nacilingva ĵurnalo, sed oni ne forgesu disponigi al la Esperanto-paĝo sufiĉe da rapidaj ĵurnalistoj.

## LA SOLENA MALFERMO.

Sabate post la oka okazis la malferma kunsido de la kongreso. Estis disponigita al ĝi la granda festsalonego en Neue Burg, kiu estis ornamita de la aŭstria koloroj ruĝe-blanke kaj kiun dominis



C. C. GOLDSMITH,  
Direktoro de U. E. A.





Maurus el Egiptujo inter aŭtoqramemuloj.

grandega verda stelo. La kunsido komenciĝis per la aŭstria nacia himno. S-ro Steiner petis la reprezentanton de la registaro, vickancelieron Baar-Baarenfels, malfermi la kongreson. En germanlingva parolado, poste tradukita, la vic-kanceliero esprimis sian simpatian al Esperanto, diris, ke la aŭstria registaro ĉiam subtenas Esperanton kaj malfermis la kongreson. Post kelkaj aliaj formalaj alparoloj kongresa prezidanto Steiner parolis, salutis en la nomo de la federacia prezidanto Miklas kaj federacia kanceliero Schuschnigg kaj aparte esprimis sian dankon al ministro Stockinger, kiu ĉeestis la kunsidon. Estis Stockinger, kiu kaŭzis la eldonon de 50 oficialaj bildpoŝtkartoj kun Esperantlingva teksto kaj kiu la unuan fojon enkondukis Esperanton en la horaron de la aŭstraj fervojoj.

Granda momento estis, kiam prof-ro Bujwid kun la nepo de Zamenhof portis en la salonegon la unuan Esperantan flagon de la kongreso en Boulogne-sur-Mer. Mistera sento eliris de tiu malnova relikvaĵo de la movado kaj traflugis la salonon. Entuziasmo prenis la homojn, ili ekstaris kaj kantis la himnon. — Sekvis alparolo de la prezidanto de UEA generalo Bastien. Estas ĉiam plezuro aŭskulti alparolon de Bastien. Liaj paroladoj estas tiel klare konstruitaj, enhavas tiom da delikata dialektiko kaj logiko kiel nenies alparoloj.

Poste sekvis la tradiciaj alparoloj de la reprezentantoj de registaroj kaj de naciaj Esperanto-organizoj. Estas ĉiujare la sama afero.

Plej grandan aplaudon rikoltis la reprezentanto de la ligo de germanaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo: Bruno Gahler, kiu finis sian alparolon per la vortoj... « ke la germana Esperanto pro-

gresu malgraŭ ĉio ». Oni komprenis la aludon. La lastan paroladon faris Leo Belmont. Ĝi estis tre malbone komprenebla kaj tre longa. Oni ne forgesu, ke la unuan tagon la kongresanoj plejparte estas tre lacaj pro dumnokta vojaĝado kaj ne estas tre rezistemaj al longaj paroladoj. Tamen neniu perdis la humoron. Bedaŭrinde la akustiko de la salonego estis tre malbona kaj ĉar krome multaj parolantoj parolis tro mallaŭte oni multon ne komprenis. Oni nepre estus devinta havi laŭtparolilan instalon. Tamen la solena malfermo estis impresara aranĝita, nur mankis iu vera entuziasma parolado. Bedaŭrinde ni nuntempe ne havas veran kongresparoladiston inter ni. La malferma kunsido estis engravita en gramofondiskojn, kiujn sekvan tage la aŭstria radio parte disaŭdigis.

Post la kunsido ni estis invitataj eliri el la kongresejo por admirari la iluminacion de la urbodomo, kiu okazis je la honoro de la kongreso. Estis fabela aspekto vidi la belajn gotikajn formojn de tiu inda konstruaĵo en fea lumigo. Tuj sekvis en la salonoj de Neue Burg

### LA INTERKONATIĜA VESPERO.

Estis agrabla aranĝo. Oni havis bufedon, tiel ke oni neniel estis malhelpata libere promeni tra la salonoj por malkovri malnovajn konatulojn kaj prezentiĝi al nekonatuloj. Regis vera Esperantuja atmosfero. Oni nur aŭdis nian lingvon kaj por multaj estis eble la unua fojo, ke ili aŭdis Esperanton de la lipoj de malsamnaciato. Vigle la grupoj interŝanĝis, babilis kaj amuziĝis ĝis meznokto.

### DISERVOJ.

Dimanĉe frumatene estis okazigataj Esperantistaj diservoj. Protestantan diservon celebris pastro M. A. van Pernis el Nederlando je la oka matene. Samtempe okazis laŭ la programo israelida diservo. Je la naŭa okazis katolika diservo, kiu fariĝis tre solena. La sanktanan meson celebris nia samideano, lia eminenco kardinalo d-ro Innitzer, ĉefepiskopo de Vieno, kiu aparte por tio interrompis sian libertempon. La predikon faris en Esperanto pastro P. M. Carolfi el Italujo. Ĉeestis la solenaĵon, kiu okazis en la impona Votivkirche, diversaj altaj eminentuloj. Post la diservo oni foriris al la tombo de la nekonata soldato, tute proksima al la kongresejo. Antaŭiris la karavanon la polica muzikistaro, kiu dum la solena malfermo jam kaj dum la diservo estis ludinta. Sur la tombon de la nekonata soldato prezidanto Bastien metis nome de la kongreso florkronon kaj eldiris jenajn parolojn: « Al vi nekonataj soldatoj ni metas florkronon. Vi mortis por via patrujo kaj nun estas unuigitaj kun la mortintoj de aliaj landoj. Laŭ nia idealo ne plu estu milito. Ni ĉiuj laboru por ĉi tiu celo kaj tio estu la plej grava rekono por via viktimo. » Estis solena momento kiam franca generalo diris tiujn vortojn ĉe la tombo de soldato el antaŭa malamika lando. — Laŭ la programo okazis ankaŭ malnovkatolika diservo.

### SCHÖNBRUNN.

La posttagmezo de dimanĉo estis dediĉata al ekskurso. Nia kosmopolita societo veturis aŭtobuse al la kastelo Schönbrunn tute proksima al la urbo. Tie oni vizitis la belegajn salonojn de la kastelo en mlgrandaj grupoj kun gvidisto kaj tradukanto. Post la vizito oni ĝuis la parkon de Schönbrunn kaj reveturis je la sesa al la urbo, kie oni komune manĝis en hotelo Münchnerhof, sufiĉe proksime al Raimundteatro, kie ni estis vidontaj la teatraĵon.



Goldsmith kaj Malmgren diskutis antaŭ la kastelo Schönbrunn. En la fono s-ino Malmgren.

## LA BLANKA ĈEVALET'.

Sukceso ĝi estis, fakte, grandega sukceso. La plej bela aranĝo de la tuta kongreso. Ni gratulu la kongresan komitaton pro ĝia elekto kaj la aktorojn pro ĝia lertega efektivigo. Entuziasmo regis en la teatro, ne unu homo forkuris post la unua akto, sed ili ĉiuj estus restintaj ĝis meznokto se la prezentado ankoraŭ estus daŭrinta pli longe.

Estis ludata la Blanka Ĉevalet'. Ĉu mi bezonas rakonti pri la enhavo? Ne, certe ne, ĝi jam estis tiel konata en la tuta mondo, ni ĉiuj jam vidis ĝin sur scenejo aŭ en filmo, ni kantas kaj fajfas la melodiojn ĉarmegajn parkere. Sed nova estis ĝia prezentado en Esperanto kaj plej ĝojige estas, ke ĝi neniel perdis en tiu lingvo sed eĉ fariĝas pli bela kaj ensorĉiga per ties belsoneco.

Vere la Blanka Ĉevalet' ne estas teatraĵo, nek vera opereto, sed stranga lerte farita kombinaĵo el modernigita popolkomedio, tirol-ado, amerika ĵazo kaj revuo. Sed des pli bone. Ĝi enhavas ion por ĉiu. Tiuj kiuj ne bone scias Esperanton povis ĝui la tre belajn naciajn kostumojn kaj popoldancojn de la raviga aro de dancistinoj; la ŝatantoj de kanto ne malpli havis okazon ĝui kaj la amatoroj de fluanta trafa esperanta dialogo ankaŭ estis kontentigitaj. Ho, ĝi enhavas tiom da plaĉaj scenoj, tiom da sorĉaj melodioj, ĝi plaĉis, — ĝi plaĉis al ĉiuj. Aplauĉo dum plena scenejo interrompis la ludon multfoje kaj ripetigoj estis dezirataj.

La aktoroj ludis bonege. Kun surprizo mi poste aŭdis ke ili ne estas Esperantistoj; mi estus vetinta ke ili estas. Ili pli bone prononcis ol multaj malnovaj Esperantistoj kaj oni ne povis kredi ke ili ludas en ne scipovata lingvo. Je la fino de la prezentado la aplauĉo ne emis ĉesi, kaj krom la aktoroj kongresa prezidanto Steiner kaj la teatra direktoro Leo Kraus devis aperi sur la scenejo por akcepti la aplauĉon de la entuziasmita publiko.

## KAHLENBERG, GRINZING.

Lunde posttagmeze denove estis ekskurso por la aliĝintoj al la aranĝo B, t.e. la plejmulto, ĉ. 700 kongresanoj. Unue oni veturis aŭtobuse al sur Kahlenberg. La urbo Wien konstruiĝis tie dum la lastaj jaroj larĝegan aŭtostradon, kiu per grandaj kurboj kondukas al la supro de la 500-metra monto Kahlenberg. La strado mem jam estas vidindaĵo, sed la elrigardo desur Kahlenberg ankoraŭ estas pli bela. Oni vidas super la tutan urbon de Vieno. Bedaŭrinde la malproksimo pro nebulo ne aperis videbla, sed cetere la vetero estis belega kaj agrable varma. La unua duono de la kongreso estis favorata de bela vetero,

bedaŭrinde hodiaŭ dum la grandaj ekskursoj ĝi estas malafabla. Sur Kahlenberg la ekskursantoj trinkis kafon, manĝis kukon, fotografis fervore kaj promenis aŭ kuŝis en la herbo. Vendanto de tirolaj ĉapeloj kun altaj plumoj suferis la atakon de skandinavoj kaj nederlandanoj kaj post kelkaj minutoj ili forĉetis lian tutan provizon. Poste ili havis grandan sukceson per siaj alte plumumitaj tirolaj ĉapeloj. Certe, se la kongreso daŭrus plurajn semajnojn, niaj samideanoj tute aŭstrigus siajn kostumojn! Vespere la aŭtobusoj forportis en etapo la ekskursantojn al Grinzing kie ni en ĉarresta restoracia ĝardeno aŭskultis vian muzikon, popolkantojn kaj atendis la vespermanĝon. Ricevi vespermanĝon kaŭzis ioman malfacilecon kaŭ daŭris longe ĝis ĉiuj ricevis pladon kun io manĝebla. Eĉ kongresa prezidanto Steiner mem zumis en la kuirejo de la restoracio kaj, mi ne scias, pli grandigis aŭ malpli grandigis la malordon. Dum la malfrua vespero la aŭtobusoj reportis iom post iom la kongresanojn al Vieno, la lastajn je meznokto.

## LABORKUNSIDO DE UEA, AKCEPTO EN URBODOMO.

Marde matene estis aranĝata la unua publika laborkunsido de UEA, pri kiu troviĝas raporto aliloke en tiu ĵurnalo. Je la dekdua la kongresanoj estis oficiale akceptataj en la urbodomo. La esperantistoj ĉeestis en tre granda nombro, sed tamen ne tute plenigis la grandiozan festsalonegon en la urbodomo. Ĝi jam en si mem estas bela vidaĵo, dum la akcepto ankoraŭ multaj belulinoj en naciaj kostumoj gajigis la bildon. Akceptis nin en la nomo de la urbestro Supera Senata Konsilisto (ho la belaj titoloj en Aŭstrio) d-ro Maly. F-ino Lidja Zamenhof alparolis lin kaj fiksas kongresinsignon al lia brusto. D-ro Maly salutis la kongreson kaj diris i.a.: ni ĝojas kaj dankas ke vi elektis Vienon kiel kongresurbon, sed vi certe ne bedaŭros tion. Malgraŭ la tempomanĝantaj kunsidoj vi espereble povis vidi la urbon kaj mi esperas ke vi estas ravitaj pri ĝi. Vieno estas kultura centro, tion jam montras la ekstera aspekto de la urbo. Por kongreso de spirita movado — Esperanto — Vieno estas taŭga loko kaj havas konvenan atmosferon. Vieno pro sia situo estas interligilo inter la popoloj kaj Esperanto estas helpilo por tio. Tial ni ankaŭ bone komprenas Esperanton. Ni esperas, ke Esperanto faros bonan paŝon antaŭen pere de la viana kongreso.

Respondis al la urba reprezentanto generalo Bastien, kiu finis sian mallongan alparolon per la komplimento... « mi kaj aliaj francoj trovas ke Vieno tre similas al Parizo. Mi estas parizano, do vi komprenas kion tia eldiro signifas ».

## SIPVETURO SUR DANUBO.

La posttagmezo de la sama tago estis dediĉata al fakaj kunsidoj de Komitato de UEA, Esperantista Akademio, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Stenografistoj, Veterinaroj, Komercistoj, Skoltoj.

Vespere estis ekskurso aŭ al Prater sub konduko de vianaj Esperantistoj aŭ ekskurso sur Danubo. La vetero estis belega kaj partoprenemis la ŝipekskurson pli da homoj ol oni antaŭvidis. La ŝipo estis tre granda, sed ĝi ankaŭ kunportis multajn neesperantistojn, tiel ke ĝi fariĝis plenplena. Tamen fine ĉiuj trovis lokon kaj la belega veturo tra la varma somera nokto ĉarmis ĉiujn. Viena orkestro ludis seninterrompe kaj kun la iro de la tempo oni eĉ havigis al si iom da spaco, tiel ke ni fakte povis danci sur la ŝipo kiel promesite. Se la grupo en Prater same bone amuziĝis kiel ni sur la ŝipo, LKK povas esti kontenta.

## LABORPLENA MERKREDO.

Merkrede nur unu malgranda ekskurso: rondveturo tra la urbo por parto de la kongresanoj estis aranĝita; reste oni laboris. Matene okazis prelegoj en la somera universitato, pri kiuj estas raporto aliloke. Krome okazis granda nombro da fakkunsidoj, kiuj mi komprenable ne povis ĉeesti mem: de Kristana Esperantista Ligo Internacia, Bahanoj, Fervojistoj, Ĵurnalistoj, Poŝtmarkkolektantoj, UEA-komitato, Geinstruistoj, ILEPTO, Juristoj, Internacia Scienca Asocio, Konferenco de la virinoj. Eble ĉeestintoj bonvolos raporti.

## LA SOMERA UNIVERSITATO.

La somera universitato estis sub la prezido de s-ro profesoro d-ro *Odo Bujwid* el Krakovo. Ĝi okazis dum lundo kaj merkredo dum la tuta mateno. Ĝi devis pritrakti la temon de Kulturaj kaj Ekonomiaj Problemoj de Eŭropo, sed okazis ankaŭ pluraj prelegoj pri aliaj temoj. Lunde iom post la naŭa la prezidanto prof. Bujwid malfermis per kelkaj vortoj la someran universitaton kaj transdonis la parolon al

s-ro inĝ. *Isbrücker* el Nederlando. Li parolis pri la rilatoj inter Nederlando kaj Mezeŭropo sur la kultura kampo, pri la influo de nederlandaj geniuloj al la aŭstria kulturo kaj renverse. Li ankaŭ menciis la aŭstriajn infanojn, kiuj dum la milito estis akceptataj en Nederlando kaj nun plifortigas la ligilojn inter la du landoj.

Por la aŭstria registaro parolis registara konsilisto *A. Müller*, germanlingve. Lia parolado estis tuj tradukata Esperanten. Lia temo estis Necesaj Kulturaj kaj Ekonomiaj Rilatoj en Eŭropo. Li diris inter alie, ke la zorgoj kaj amuzoj



de la diversaj popoloj estas ĉiam la samaj. Ili sur ĉiuj kampoj estas kunligataj. La ligo de nacioj estas necesa, jam per la fakto ke pli ol 4000 diversaj internaciaj kontraktoj estas deponitaj ĉe ĝi. Esperanto estas la komplemento por la rilatoj inter la popoloj.

Kiel reprezentanto de la greka registaro parolis s-ro inĝ. *Pawlos Gianelia*. Li parolis pri la influo de la impostoj sur la ekonomion de la popoloj. Reirante ĝis Solon li riĉe dokumentis siajn eldirojn. Li montris kiom la doganimpuestoj malhelpas la komercon kaj kiel sole justajn impostojn li status la impostojn de la terposedantoj.

Nia konata samideano *Scherer* parolis pri la temo: Per unu Lingvo tra la Mondo. Li helpe de siaj abundaj spertoj povis pritrakti tion en tre interesa maniero. Cetere li laŭ oratora vidpunkto estis sendube la plej eminenta el ĉiuj paroladintoj de la tuta kongreso. Estas plezuro aŭskulti lian parolmanieron. Li diris, ke estas malĝusta pretendo, ke oni povas vojaĝi tra la mondo per la angla lingvo sole. Tiu lingvo nur estas la internacia lingvo de la kelneroj, sed en aliaj rondoj, ekz. en la eleganta societo la franca lingvo estas internacia. Cetere ne la angla lingvo estas internacia sed la *dolaro*. Se oni volas vojaĝi inteligente oni devas scii Esperanton. Per Esperanto oni ne sole interkompreniĝas, sed oni per ĝi malfermas la korojn. La parolanto diris, ke li skribante al Esperanta grupo ĉiam ricevis multajn invitojn kaj estas kore akceptata. En Japanujo li foje devis trinki dum unu tago dudek kvin tasojn da teo. Esperanto ankaŭ estas pli praktika, ĉar estas ĉiam pli facile aranĝi tradukon de nacilingva parolado en Esperanton ol en alian naciaan lingvon.

Kiel lasta en la lunda kunsido paroladis s-ro *Höfert* el Ĉeĥoslovakujo pri Ex Oriente Lux. Kristo venis el oriento, sed tamen ankoraŭ regas malpaco. Zamenhof per la interpopola lingvo povos doni la savon kaj pacon al niaj popoloj.

Dum tri horoj la paroladoj rapide sinsekvis kaj la publiko estis sufiĉe laca. Se studentoj en universitato devus aŭskulti siajn prelegojn seninterrompe, ili lasus siajn profesorojn solaj. La aranĝantoj de somera universitato pripensu, ke kongresanoj ne estas pli rezistemaj homoj ol studentoj kaj donu al ili estonte iom da tempo inter la prelegoj por spiri freŝan aeron.

Cetere estis granda manko, ke la nomoj de la prelegoj kaj prelegantoj ne estis indikitaj en la kongresa libro. Mi aŭdis multajn kiuj plendis ke ili maltrafis prelegon, kiun ili estus ŝatintaj aŭskulti aŭ ke ili devis aŭskulti prelegon kiu ne interesis ilin.

Merkrede la somera universitato estis daŭrigata. Parolis unue samideano el Japanujo kies nomo forflugis en la aero



*Egipto Mahrus en rondo de siaj amikinoj ĉiulan*

kaj nenie estas trovebla presita. Li parolis pri la familia sistemo en Japanujo, precipe pri la situacio de la japana virinoj. En Japanujo la familia ludas pli grandan rolon ol ĉe ni kaj filo ĝis sia trideka jaro bezonas la permeson de siaj gepatroj por edziĝi. La edzinoj havas kiel unuan devon obei siajn edzojn, sed estas malĝusta opinio kredi ke ili estas malsaĝaj aŭ malfeliĉaj. Okcidentuloj studu per Esperanto orientajn vivkondiĉojn por formigi al si klaran bildon.

Tiam parolis nia granda verkisto samideano *Kalocsay*. Lia temo nomiĝis La Esperanta Literaturo, sed li grandparte parolis pri la aktuala disputado pri neologismoj. Li senkulpigis sin mem pri tiu kulpigo dirante ke la materialo de la literaturo estas la « vorto » kaj la neologisma demando estas fundamenta por ĝi. Ŝajnas al mi kiel raportanto de la semajna ĵurnalo, ke mi rajtas kaj devas raporti iomete pli detale pri tiu parolado kiu tuŝis vere vivproblemon de Esperantismo. La parolanto diris, ke la Esperanta literaturo estis oficiale pritraktata kiel cindrulino de nia movado, sed aliaj samideanoj ne akceptis tiun staton kaj volas antaŭenpuŝi nian literaturon. La literaturistoj devas riĉigi la lingvon por adapti ĝin al la bezonoj de literaturo. Tio altiras malsimpligon kaj tial estiĝas batalo inter emuloj de simpleco kaj emuloj de riĉeco. Lastatempe ĝi akriĝis. Dum Zamenhof vivis li estis la supera instanco, sed hodiaŭ estas facile ataki tiujn, kiuj per sia literaturo havas la evoluon de la lingvo en siaj manoj. Vera literaturo ne estas ebla sen la necesa vorttrezoro. La kunmetitaj derivitaj vortoj estas logike abstraktaj skeletoj, sed havas neniun koloron kaj sentohavon. Vera literaturo ne povas ekzisti sen tiuj vortoj kaj sen alpreni neologismojn malfacilaj literaturaj taskoj

estas neplenumebaj. Hodiaŭ kiam Esperanto jam estas pli vaste uzata estas permeseble riĉigi ĝin; fariĝante malpli facila ĝi samtempe fariĝas pli valora. Oni do lasu al la literaturistoj liberan manon. Literaturo estas hodiaŭ pli bezonata ol iam. Ĝi sole povas manteni la internan ideon. Ni scias, ke nia movado malbone fartas, dum ke la literaturo ĝuste nun progresas kiel neniam antaŭe. Tio signifas ke Esperanto jam estas vivanta organismo kaj se la organizacio malbone fartas Esperanto rifuĝas en la azilon de la literaturo kaj transformas ĝin en palacon. Tio estas la tasko kaj merito de la « kulturesperantistoj ». Hodiaŭ jam valoras la penon lerni Esperanton pro la sola literaturo. La literaturo vere prosperas kaj Esperanto fariĝis pli kaj pli taŭga instrumento por literaturo. Antaŭ la milito nia poezio restis sur la kampo de la logikeco, pinta epigramateco, dum ke ĝi hodiaŭ kantas, fluas, sentas. Tion la parolanto montris per kelkaj poemoj recitataj. Jen recitis vere kapabla recitisto! Neniame min tuŝis Esperanta poemo tiamaniere kiel el la buŝo de *Kalocsay*. La parolado estis tre lerta kaj Esperanto fluas kun tia facileco kaj rapideco ke malproksime sidantoj eĉ malbone komprenis. Sed por la proksime sidantaj estis ĝuo aŭskulti.

Sekvis parolado de samideano profesoro *Kamaryt*, kiu parolis pri ĉeĥa filozofio kaj ke ankaŭ *Masaryk*, kiu en 1880 fariĝis profesoro en la universitato ĉeĥlingva en Praha multe verkis sur tiu kampo kaj havis grandan influon. Mi bedaŭras ke mi ne povas raporti pri la tuta parolado, kiu cetere suferis pro manko de nigra tabulo, ĉar estas ĉiam malfacile kompreni fremdajn nomojn. La superrigardo pri la ĉeĥa filozofio venis el la buŝo de vere kompetenta homo.



S-ro d-ro *Spielmann*, direktoro de la svisa Esperanto instituto parolis pri Esperanto en PTT. Li diris ke la monda poŝt-unio havas kiel oficialan lingvon la francan, sed la angloj kaj germanoj protestis, tiel ke fakte la poŝto havas tri lingvojn. Pro la malfacileco de la lingvoj, ili ofte estas malbone scipovataj kaj la interkompreniĝo suferas. La unuaj poŝtkongresoj ne estis malfavoraj al internacia lingvo, sed tiam Esperanto ankoraŭ ne ekzistis. Nun la poŝto estas malfavora kaj klopodoj de ILEPTO ne havis sukceson. Ni esperantistoj devas montri, ke Esperanto jam multe estas uzata kaj nur per tio oni povos atingi ion ĉe la altaj instancoj.

Parolado pri baroko en Varsovio, kiu samtempe devus propagandi por la proksima kongreso ne povis okazi, ĉar filmprojekciaparato ne povis estis instalata.

Mallonge antaŭ tagmezo estis la horo kaj la prezidanto fermis la someran universitaton de la dudekoka. Ĝi donis vere multajn interesajn prelegojn kaj bone sukcesis.

Arthur BAUR

\*

Budapeŝto, la 19an de aŭg. '36.

Jam Vieno estas forlasita de siaj eksterlandaj gastoj kaj en Budapeŝto nun estas okazanta postkongreso vizitata de ducent partoprenantoj. Ĝi estas tre bone aranĝita kaj Vieno jam endanĝeriĝas paliĝi en la memoro. Tamen mi devas forŝteli kelkajn horojn por ankoraŭ raporti pri la lastaj tagoj de la Universala Kongreso. Ne restas multe, ĉar la plej gravaj aferoj, t.e. la vera poresperanta laboro de la kongreso estas raportotaj aliloke.

### TUTTAGAJ EKSURSOJ.

Jaŭde la kongresanoj ekskursis al diversaj direktoj. Bedaŭrinde la vetero estis malfavora, sed mi tamen aŭdis de samideanoj partoprenintaj, ke ili bone amuziĝis kaj ĝuis la ekskursojn, eĉ se ili ne profitis ilin tiom kiel ili estus povintaj en brila vetero. La plej longa ekskurso estis aŭtobusa kaj kondukis al Raxalp-Semmering-Vöslau-Vieno; t. e. al sur Raxalp oni veturis per aera kablofervojo. Sur Raxalp, en alteco de 2000 metroj estis terura malvarmo kaj pro nuboj oni ankaŭ ne vidis multe. Tamen la vojaĝo per kablofervojo kaj poste la pitoreska regiono de Semmering tre interesis. La dua ekskurso ankaŭ kondukis supren en altecon de 1800 metroj sur Schneeberg, unuparte per fervojo kaj tute supren per dentrada fervojo. Supre ankaŭ estis tre malvarme: malmultajn gradojn super nulo kaj terure blovis, tiel ke oni ne povis promeni ekstere sed amuziĝis en la hotelo apud

fajrujo. Laŭ miaj informoj la manĝoj dum la ekskursita tago ĉiuloke estis bonegaj. Aliaj aŭtobusaj ekskursoj tuttagaj iris unu al Mödling-Heiligkreuz-Baden-Gumpoldskirchen, dua al St Pölten-Melk-Dürnstein-Krems. Krome multaj samideanoj ne partoprenantaj en la oficialaj ekskursoj aranĝis proprajn pli malpli longajn, ekz. vizitis Karl-Marx-hof tiel fama pro la civila milito kaj vespere estis troveblaj en ĉiuj restoracioj de la urbo.

\*

### VENDREDE DENOVE LABORO.

Matene estis la dua laborkunsido denove bone vizitata. Laŭ la programo devus okazi konkurso de opinioj pri jenaj libroj: Enciklopedio de Esperanto, Esperanta Bibliografio de Stojan, Vortaro de Wüster. Sed tiu konkurso tute falis sub la tablon, ĉar la tempo eĉ ne sufiĉis al la komitatoj de UEA por detale raporti pri la laboroj de UEA. Post la tagmanĝo denove estis aŭtobusa rondveturado por la kongresanoj kiuj ankoraŭ ne jam partoprenis kaj por la aliaj estis vizito al la ĉambregoj de Hofburg. Posttagmeze ree okazis vico de fakkunsidoj: Internacia Scienca Asocio Esperantista, Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj, Senalkohola kaj Sentabaka Kulturo, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj kaj la Ĝenerala Kunsido de Aŭstria Esperanto-Asocio.

### LA KONGRESO DANCAS.

Sub tiu moto la internacia balo festiĝis en Vieno. La granda festsalono kun ĉirkaŭantaj galerioj malfermiĝis kaj oni ankoraŭ foje havis okazon vidi la tutan kongreson kune. Ili alvenis en balokostumoj aŭ en naciaj kostumoj, aŭtomobile aŭ piede, el ĉiuj anguloj de la urbo, kun la firma intenco same bone amuziĝi kiel la kongreso Viena antaŭ 122 jaroj. La muziko ankaŭ tute restis en viena tradicio kaj ludis senfinajn elektrigajn valsojn dum ke ĝi fiaskis en moderna dancmuziko. Sub la lerta gvidado de la aŭstriaĝ gesamideanoj la kongreso ekdancis kaj sur la plankego turniĝis sennombraj paroj en la ritmo de la vienaj valsoj. Tamen oni havis tute sufiĉe da loko, ĉar multaj nedancemuloj, pro nescipovo, laceco aŭ maljuneco preferis nur rigardi la belan bildon. La kadro de la balo en la imperiestra salonegato de Hofburg vere estis inda al ĝi kaj du interŝanĝantaj orkestroj faris sian eblon. Interrompis la dancadon prezentoj de kanto kaj popoldanco kaj la granda konkurso pri belulinreĝino de la kongreso. Prezentiĝis granda aro da belulinoj al la konkurso, plejparte vestitaj en naciaj kostumoj, — ĉar mi an-

korau ne diris, proksimume la duono de la ĉeestantaj belulinoj estis vestitaj en naciaj kostumoj kaj ankoraŭ pligrandigi sian propran ĉarmon per tiu de la ravaj kostumoj. La kongresanoj kiel juĝantoj elektis japaninon en japana kostumo reĝino de beleco en la kongreso.

Cetere, tiu japanino, kiom ŝi estis admirata dum la kongreso, kiom da fojoj fotografata kaj kiom da aŭtogramoj ŝi devis doni! Ho, statistikemulo havus laboron kalkuli ĉion. Sed la kongreso estis prava elekto ĝin reĝino, ŝi estis tiel ĉarma. Post tiuj aranĝoj la balo ree ekvivis kaj la veraj balemuloj daŭrigis la dancadon ĝis post la dua, kiam la internacia balo devis disiri.

### LA FERMA KUNSIDO.

La lasta kunsido de la Kongreso ankaŭ estis vera laborkunsido. En la vico de la publikaj laborkunsidoj la tria. Okazis la granda raporto de Malmgren pri propagando de Esperanto. Esperable li kiel eble plej detale presigos ĝin en Esperanto Triumfonta. Scherer diris kelkajn vortojn pri Heroldo de Esperanto kaj ĝia daŭriganto: Esperanto Triumfonta. Li diris, ke nun, kiam la semajna gazeto troviĝas en neŭtrala lando neniu havas pretekston ne aboni ĝin. Oni jam antaŭe estis dirinta, ke kontrakto kun s-ro Teo Jung estas farita kaj ke la ĝeneva ESPERANTO kaj HEROLDO (t.e. Esp. Tr.) estas kunigataj. Aplauĉo salutis tiun solvon de la gazeta demando, kiun ni dum tiel longa tempo sopiris.

Nun la prezidanto de UEA generalo Bastien dankis s-ron Steiner pro la aranĝo de la kongreso, li parolis pri la laborego kiun Steiner devis faris, li dankis al LKK kaj al ĉiuj helpantoj kaj al la aŭstriaĝ eminentuloj kiuj subtenis la kongreson. Steiner respondis kaj diris, ke tio fakte estis la unua fojo, ke li povis kunesti en kunsido de la kongreso, ĉar ĉiam la laboro malhelpis lin. Li siaflanke dankas al diversaj personoj kaj adiaŭas la kongreson. La franca karavano transdonis florojn al s-ino Weber, f-ino Hojtasch kaj f-ino Falk pro ilia laboro en LKK. Leo Belmont en poemo priskribis la kongreson kaj rikoltis ĉi tiun fojon koran aplauĉon. Mallonge antaŭ la dekdua post duonsukcesa kantado de la himno la kongreso estis fermata. — Ek al la jubilea kongreso en Varsovio la proksiman jaron.

Dum la daŭro de la posttagmezo la kongresanoj disiĝis en diversaj direktoj. La vetero denove estis brila. Unuj veturis kun la turisma aranĝo de la kongreso Tra Aŭstrio. Aliaj veturis ŝipe, trajne kaj buse al la postkongreso en Budapeŝto. La plejparto verŝajne rekte ekvojaĝis hejmen.



grandan suplementon, dum en 1937 estos plena jarlibro.

3. En 1934-35 estis 11 numeroj de la gazeto; en 1937 estos 12.

4. En 1934-35 estis neniu amortizo; en 1937 ni kalkulas 450 fk. tiucele.

5. En 1937 ni antaŭvidas sub « voj-aĝoj » sufiĉan sumon por plena kunveno de la Estraranoj, kiu estis neebla en 1935.

S-ro *Malmgren* parolis pri la kaŭzoj de la translokigo, kaj pri la agado de la Estraro, kiu laŭ la nova statuto devus gvidi la movadon.

### Dua Laborkunsido, 14an de Aŭgusto.

La *Prezidanto* malfermis la kunsidon, kaj tuj faris paroladeton pri la mortintoj de la pasinta jaro. Li speciale memorigis pri S-roj *Merchant*, *Kreuz*, *Arabeno*, *Arnhold*, *Cuadra*, *Petiaŭ* kaj *Prof. Richet*. Ĉiu silente staris dum kelkaj momentoj.

Li legis *telegramon bondeziran de Kanceliero Kurt von Schuschnigg*, kaj salutojn de S-ro *Clarena*, *Ĝenova*, S-ro *Ŝtampfer*, *Palestino*, kaj S-ro *Riednicki*, *Polujo*. La Vic-urbestro de *Carlsbad* salutis la kongreson.

Poste la *Prezidanto* respondis al kelkaj diraĵoj de tiuj, kiuj plendis pri la translokigo de la centra oficejo, kaj montris ke ĝi estis nepre necesa pro la financa stato de la Asocio. Al la membro, kiu plendis pri la malalteco de la kotizo por la simplaj membroj, li montris ke eĉ tiu sumo estas tro alta por multaj societoj.

Ĉar estis plendoj pri la aludoj al la antaŭaj gvidantoj de UEA, li iom detale klarigis la situacion kaj la agadon post la kongreso en *Stockholm*. Okazis kunveno de la Estraro en *Ĝenevo* *Septembro* 1934. Oni trovis, ke la ŝuldoj tiam estis pli ol 40.000 sv. fk. La *Asocia Kapitalo* kaj parto de la *Garantia Kapitalo* estis foruzita por ŝtopi la truon de tro grasa budĝeto. Li klarigis, per kelkaj trafaj ekzemploj, kiamaniere oni malbone agis en *Ĝenevo* pere de la financa servo. Li poste petis demandojn kaj proponis limigi la paroltempon al 5 minutoj por ĉiu parolanto.

D-ro *Medrkiewicz*, *Lublin*, parolis pri la idea bazo de la lingvo, kaj la rezolucio de la Ĝenerala Estraro en *Krakovo* en 1932. Li proponis ke UEA postulu monon de la ŝtatoj.

S-ro *Lejzerwicz*, *Polujo*, parolis pri eblaj financaj rimedoj, kaj la starigo de *Fondo de la Zamenhofa Obolo*. Ĉiu membro kaj ĉiu kursano donacu 0.50 sv. fk.

D-ro *Spielmann*, *Svisujo*, diris ke kotizoj devas esti egalaj en ĉiuj landoj, kaj proponis ke UEA verku propagandilojn por praktikaj aferoj kaj por la enkonduko de Esperanto en la lernejo.

F-ino *Lidja Zamenhof* parolis pri la

du oficejoj — en *Ĝenevo* kaj en *Londono*, kaj pri la *Biblioteko*. Al la demando pri la oficejo, la *Direktoro* respondis. Pri la *Biblioteko* la *Prezidanto* respondis ke ĝia komenco estis donaco de la *Svisa Societo*, kaj ke la *Komitato* estis konsentinta ke tiu parto restu en *Svisujo*. Responde al demando, oni klarigis, ke la decido fordoni la bibliotekon estis nur rezulto de la fakto ke oni ne plu havas la monon por konservi ĝin.

Tiam okazis voĉdono pri la ĉesigo de la diskuto, en kiu 60 subtenis la proponon kaj 30 kontraŭis ĝin.

S-ro *Petit* parolis pri la laboro farita de la komitato, kaj klarigis kelkajn planojn por estonta laboro. La *Prezidanto* dankis al li kaj legis rezolucion de S-ro *Ŝtampfer* en *Palestino*, kiu petis ke oni forte subtenu U.E.A.'n.

S-ro *Kamaryt*, *Estrarano*, parolis pri la bonega laboro kaj servo de la *Prezidanto*, *Generalo Bastien*, kaj S-ro *Malmgren*, *Estrarano*, pri la neceso por kunlaborado.

### Ferma Kunsido, 15-an de Aŭgusto.

La *Prezidanto* malfermis la kunsidon, kaj informis la ĉeestantaron pri la morto de D-ro *Corret*. Ĉiu stariĝis.

Li anoncis, ke la *Komitato* decidis nomi S-rojn *Julio Baghy* kaj *K. Kalocsay*, *Honoraĵ Membroj* okaze de ilia jubileo, kaj S-ron *Fritz Stockinger* *Honora Membro* pro lia granda helpo al la movado kaj la kongreso. Granda aplaŭdo.

La *Prezidanto* tiam legis leteron de S-ro *Bouvier*, datumita *Aŭg. 13a*, kiu malaperigis la esperon esprimantan en la unua laborkunsido. Li diris, ke la *Komitato* decidis fari la lastan provon al akordiĝo, kaj se tiu ne sukcesus, la *Komitato* faros la necesan decidon.

S-ro *Petit* raportis pri la laboro de la *Komitato* dum la semajno. Okazis naŭ kunvenoj, kiuj daŭris entute pli ol 20 horojn. Inter aliaj aferoj diskutitaj estis la translokigo de la oficejo; akcepto de propono aranĝi *Konferencon en Parizo dum Pentekosto 1937* en la *Ekspozicio* kun temo « *Esperanto en la Praktiko* »; bona laboro rilate al la ebleco starigi *Landajn Asociojn* en ekstereŭropaj landoj; decido ne plu eldoni respondkuponojn post la fino de 1936; kontentiga aranĝo pri aliĝo de la *Estonia Asocio*; interkonsento kun S-ro *T. Jung* pri la gazeto; intertraktado pri kunlaborado kun *IKUE*, *IPE*, *SAT*, *ISE*; *Internacia Gazetaro Servo*; aranĝoj pri la *Jubilea Kongreso en Varsovio*; kaj multaj aferoj rilate al la administrado.

S-ro *Frey* parolis pri kvar rezolucioj, kiujn akceptis la kunveno de *TAGE*. Tri rilatas al okazigo de konferenco pri enkonduko de Esperanto en la lernejoj en *Vieno* en 1938, kaj ili estis akceptataj kun rezervo ke oni devas atendi la rezulton de la *Konferenco* en

*Parizo*. La alia estis dankesprimo al *Ministro Stockinger*.

S-ro *Malmgren* faris longan kaj tre interesan paroladon pri propagando, kiu nun estas aperanta en *Heroldo de Esperanto*.

S-ro *Scherer* petis la subtenon de la kongresanoj por la eldonisto de *Heroldo de Esperanto* en malfacila tempo. Granda aplaŭdo.

La *Prezidanto* faris dankan kaj laŭdan paroladon pri la organizintoj de la kongreso, la altrangaj protektoroj, la *L. K. K.* *Prezidanto* S-ro *Registara Konsilanto Hugo Steiner*, la kunlaborantaj membroj de la *L.K.K.*: S-ro *Frey*, D-ro *Pfeffer*, *Inĝ. H. Steiner*, D-ro *L. Steiner*, kaj protokolanto S-ro *E. Werner*. Granda aplaŭdo montris la aprobon de la kongresanoj.

S-ro *Steiner* respondis, kaj dankis al la *Prezidanto* kaj ĉeestantaro pro la afablaj vortoj. Li ankaŭ dankis al S-ro *Ulbrich*, kiu redaktis la *Esperantan parton* de la *Reichspost*, kaj al la helpantinoj en la kongresa oficejo. Li dankis ankaŭ al la *Estrarano* kaj *Komitato* de *UEA* pro la bona laboro kiun ili faris.

La *Direktoro* legis la jenan rezolucion proponatan de la *Komitato*:

« La 28a Kongreso konfirmas la deklaron de *Boulogne s. Mer.* Ĝi estas konvinkita, ke nur la ideala bazo montrita de D-ro *Zamenhof* garantias al la diversaj membroj harmonian kunlaboradon, kaj al la organizo mem regulan disvolviĝadon laŭ la unua Artikolo de la Statuto de U.E.A. ».

Akceptita akrame.

*Prof. Bujwid* parolis pri la pretigo de la *Jubilea Kongreso en Varsovio*, kaj invitis ĉiun partopreni. S-ro *Leo Belmont* deklamis poemon pri la belecoj de la *Viena Kongreso*. S-ro *Ŝapiro* invitis al *postkongreso en Bialystok en 1937*.

Fine, S-ro *Isbrücker* proponis dankon al la *Prezidanto* pro lia kapabla kaj energia gvidado de la diversaj kunsidoj. Granda aplaŭdo pruvis ke ĉiu konsentis.

---



---

## “Kiu volas mond-akiri

## Estu preta por batal!”

Samideanoj,

ĉu vi almenaŭ ĉiam kaj

ĉiuokaze portas la stelon?

Se ne, vi ne rajtas vin nomi

batalanto por nia afero.

---



---



# La Postkongreso en Budapesto

La samideanoj de Budapesto havis la bonan ideon aranĝi postkongreson en sia urbo, kaj multnombraj anoj de la universala kongreso en Vieno havis la bonan ideon aliĝi. La hungaroj ankoraŭ havas bonan famon pro sia universala kongreso en 1929, kaj tiu ĉi postkongreso tute ne malgrandigis tiun famon. Do, ĝi estis sukceso. Partoprenis la postkongreson proksimume ducent personoj, kaj ĝi daŭris de la 15-a ĝis la 18-a de aŭgusto. Antaŭ la Viena kongreso jam okazis antaŭkongreso kun la sama programo kiel la postkongreso. Ĝi estis plejparte vizitata de svedoj kaj ili rakontis al mi kun entuziasmo pri la beleco de Budapesto kaj la ĝentileco de la hungaroj.

Ĉar la postkongreso ne estis tro granda kaj ĉar en Budapesto vivas tre multaj esperantistoj, la aranĝantoj povis doni al ĉiu grupo aŭ grupeto apartan hungaran gvidanton, kiu kun granda zorgemo atentis, ke liaj eksterlandanoj havu neniujn malfacilaĵojn kaj sentu sin hejme en la fremda urbo. En la stacidomo atendis nin granda aro da Budapestaj samideanoj sub la komando de nia doktoro Szilágyi, kiu rapide faris la hotelaranĝojn kaj sendis la diversajn grupojn en aŭtomobiloj al iliaj hoteloj. Sama aranĝo estis ĉe la alveno de la ŝipo, per kiu multaj kongresanoj vojaĝis de Vieno al Budapesto. La karavano de Lyon venis per aŭtobuso kaj same la estonoj en sia propra aŭtobuso famekonata. Tuj post la enloĝiĝo — estis sabate vespere je la naŭa — niaj gvidantoj kondukis la prupojn al la parlamento, en kies restoracio sur la bela teraso apud la Danubo oni vespermanĝis kaj interkonatiĝis.

Dimanĉe matene la hungaraj Esperantistoj aranĝis sian landan kunvenon, kiun tamen ankaŭ la eksterlandaj gastoj partoprenis, tiel ke ĝi ekhavis tute internacian aspekton. D-ro Leo Lorand festparoladis pri niaj poetoj Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, kies 25-jaran esperantistan jubileon la kongreso ja estis solenonta. La parolanto diris, ke Hungarujo, kiu ĵus en la Olimpiado akiris dek orajn medalojn, povas ĝoji ankaŭ en la spirita vivo distingiĝi kaj havi du stelojn, kiuj brilas super la tutan teron, ĉien, kie Esperantistoj vivas. S-ro inĝ. Isbrücker alportis la salutojn de la kongresanoj de Vieno kaj diris, ke por ni Esperantistoj Budapesto havas apartan signifon kiel la centro de nia literaturo. La prezidanto de UEA generalo Bastien transsendis apartajn salutojn kaj igis komuniki, ke la komitato de UEA nomis Baghy kaj Kalocsay honoraj membroj de UEA por digne danki kaj rekonii ilian grandan laboron. S-ano Kapper en la nomo de la estona karavano transdonis

librodonacon al la jubileuloj kaj Bruno Gahler salutis en la nomo de la Germana Esperantista Ligo en Ĉeĥoslovakujo. Julio Baghy dankis al la parolintoj kaj diris, ke honorigo al la poetoj de Esperanto estas honorigo al nia literaturo, sen kiu nia lingvo ne povas vivi. Kalocsay estis bedaŭrinde malsana kaj ne povis ĉeesti tiun kunvenon. Sekvis ankoraŭ hungarlingva parto en la landa kunveno, kiu koncernis internajn demandojn de la hungara Esperantistaro, sed feliĉe por ni eksterlandanoj ĝi ne daŭris longe.

Posttagmeze okazis la unua rondveturo aŭtobusa tra la urbo por viziti la vidindaĵojn, kaj je la kvina ĉiuj grupoj rerenkontiĝis por kune ekskursi sur la Danubo per promenadŝipo. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da kongresanoj por ebligi la luadon de aparta ŝipo. Tamen ni havis sufiĉe da loko kaj restis inter ni Esperantistoj; nur por dancado tamen ne sufiĉis. La belega veturado sur la Danubo ankoraŭ malplilongiĝis per tombolo, per kiu oni povis gajni librojn aŭ diversajn hungarajn naciaĵojn. La tempo rapide forflugis kiel kutime en tiaj okazoj, kiam ĉiuj cirkonstancoj estas favoraj al homa bonfarto: belega vetero, ekstreme bela ĉirkaŭaĵo kaj simpatia kunularo. — Vespere estis aranĝata trombona koncerto sur la fiŝista bastiono okaze de iu hungara memortago. Al la Esperantistoj oni rezervis la plej belan lokon ĉe la muzikistoj sur la plej alta turo, de kie oni havis grandiozan elrigardon super la luman urbon kaj samtempe plejbone povis aŭskulti la muzikon. Post la fino de la koncerto la nelacigebla postkongresanaro kunvenis ankoraŭ en restoracio Debrecen por, formante familian rondon, aŭskulti ciganan muzikon aŭ interbabili.

Lunde matene estis la dua rondveturo per aŭtomobiloj, kiu, same kiel la unua, kondukis nin al multaj interesaj kaj belaj lokoj. La posttagmezo estis libera, kaj vespere kiel lasta sed ĉefa programero estis prezentado de la Budapesta Esperantistaro okaze de la jubileo. Oni disponis pri granda kaj taŭga salono kun scenejo en la Muzikakademio. La programo komenciĝis per prezento de teatraĵo de Julio Baghy: *Post la maskobalo*. Ĝin ludis tre lerte la tri Budapestaj gesamideanoj: fraŭlino Erzsébet Bodnár kaj sinjoroj Gjurkovics kaj Gerö. Verkado de teatraĵoj ja ne estas specialaĵo de Baghy, tamen la teatraĵo tre bone efikis dank' al la tre bona ludado de la amatoraj aktoroj, kiuj staris sub la reĝio de Baghy mem. La kanto de Gjurkovics, kiu havis la rolon de piero, la komika aktorado de Gerö kiel kelnero kaj precipe la ĉarmo de Erzsébet Bodnár, inter-

nacie konata sub la nomo « la blonda diablino », en la rolo de pierino meritis la koran aplaŭdon de la publiko. — Sekvis pluraj kantinterludoj, kaj post la paŭzo D-ro Szilágyi devis transpreni la grandan festparoladon. Li tre lerte kaj kun multe da humoro sin tiris el la afero. Li komencis sian paroladon per tiel hiperbolaj laŭdoj por Baghy kaj Kalocsay, ke tiuj protestis kaj fine saltis sur la scenejon por jeti la malfeliĉan oratoron malantaŭ la kurtenon. Baghy devis kompensi la perfortan interrompon de la solena parolado per deklamo de kelkaj el siaj poemoj. Kalocsay malfeliĉe ankoraŭ ne tute resaniĝis kaj estis tiel raŭka ke eĉ unu vorton li ne povis diri. S-ano Halka en lia loko deklamis kelkajn el liaj poemoj. Post tio profesoro Mihalik adiaŭis la postkongreson, kaj sekvis la lasta programero: groteska danco de fraŭlino Szász, kiu ankaŭ ricevis grandan aplaŭdon.

Post tiu tre bone sukcesinta prezentado, kiu montris la altan nivelon, la « kulturesperantistecon » de la Budapestaj samideanoj, la postkongresanoj parte denove iris al restoracio Debrecen kaj parte al dancejo por konvene fini tiun amuzan postkongreson.

Oficiale la postkongreso finiĝis la sekvintan tagon, sed ankoraŭ multaj eksterlandanoj enamiĝintaj je Budapesto aŭ ties enloĝantinoj restis. Merkrede alvenis nova karavano de estonoj, kiuj denove havis privatan postkongreson, kaj kiam mi la 28-an de aŭgusto mem forvojaĝis, mi tamen ne estis la lasta de la postkongresanoj kaj krome oni parolis pri la baldaŭa alveno de nova karavano de eksterlandaj esperantistoj al Budapesto. Mi estas tute certa, ke ili ankoraŭ, dum multaj tagoj, fervore kaj enlace postpostkongresadis en Budapesto. Tiu urbo fakte fariĝis kvaŭza Esperantista turisma centro kaj vere ĝi meritis tion. Ankoraŭ en neniuj urbo mi renkontis tiom da perfektaj Esperantistoj kiel en Budapesto. Ili ĉiuj parolas kun tute nekutima perfekteco kaj dank' al la artika bazo de ilia gepatra lingvo ilia prononco de Esperanto estas la plej klara kaj plej belsona imagebla. Oni ne riproĉu al mi, ke mi faras tro da komplimentoj; mi nur rakontas, kion mi observis dum dusemajna kunesto kun hungaraj samideanoj.

Entute regis tre bona atmosfero dum la postkongreso. Eĉ la organizo estis bona, nur unu afero restas nekomprenbla al mi. Kial la aranĝantoj de la postkongreso transdonis la organizon al privata vojaĝoficejo, kies oficistoj eĉ ne parolas Esperanton, kaj kiu kompreneble konsideris la postkongreson nur el negoca vidpunkto? Ĉu Budapesto ne

# Baghy-Kalocsay-jubileo

En ĉi tiu aŭtuno pasos dudek kvin jaroj de kiam la du plej grandaj poetoj de nia literaturo: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, ekkomencis sian laboron por Esperanto.

Interese koincidas kelkaj gravaj datoj en la vivo de niaj du gvidantaj poetoj: ili naskiĝis en la sama jaro, 1891, ili esperantistiĝis en la sama jaro: 1911, ili same estas hungaroj kaj same en Budapeŝto ili grupigas ĉirkaŭ si la modernan skolon de la esperanta literaturo. Ludo de la hazardo! Esence kiom da diferencoj koncerne verkistan profilon, laborteronon, legantar-tavolon... Sed malgraŭ la diferencoj, kun kia egale hela lumo brilas sur la firmamento de nia lingvo tiu ĉi ĝemela steloparo, kies malsamspeca radiado ne malhelpas, eĉ fortigas la brilon unu de la alia kaj sorĉas antaŭ niaj okuloj tian diboĉan fajroludadon, ke apenaŭ ni kapablas malfermi la okulojn tiel kutimiĝintajn al la modestaj meĉoj de nia malriĉa ĉielo...

En la siberiaj militkaptitejoj komenciĝis la eksterordinara esperantista kariero de **Julio Baghy**: tie li gvidis kursojn por diversnacionoj, tie vundiĝis por ĉiam lia sentema, justo-serĉanta animo pro la teruraĵoj de la bestiganta homo, tie formiĝis en li lia filozofio, kiun li volis fari savilo ĝuste kontraŭ tiu bestigo, kaj tie li travivis kun elementa forto la internan ideon, tiun ĉi ĉefmotoron de ĉia Baghy-a verkado kaj ago... Poste li revenis al la patrujo kaj intense partoprenis en la postmilita movado, gvidis kursojn, formis grupon, aranĝis literaturajn vesperojn ktp. Kaj venis la

estas plena de Esperantistoj, kiuj jam antaŭ sep jaroj montris sian organizkapablon? Cetere la kotizo estis tre alta, tiel ke dum la postkongreso montriĝis la sama afero kiel jam en Vieno: oni pli malmultekoste povas vivi en la fremda urbo kiel privata homo ol kiel kongresano. Devus esti male.

En Budapeŝto oni vere povas havi la senton vivi en Esperantujo. Okazis al mi dekduon da fojoj ke iu nekonato alparolis min sur la strato aŭ en la tramo en pura Esperanto, kaj ofte mi kun granda dankemo povis akcepti helpon. La ĝentileco de la hungaroj estas proverba kaj ni eksterlandanoj faris ankaŭ la plej bonajn spertojn tiurilate. Nur maleme la postkongresanoj forvojaĝis kaj, se eblas al ili, la plej multaj eble ankoraŭ nun restadus en la gastama urbo ĉe Danubo.

Arthur BAUR.

internacia labortereno: universalaj kongresoj, kiujn li partoprenis aktive kaj al kies spirita nivelo li signife kontribuis, kaj la rond-instruado Csehmetoda, dum kiu li pruvigis unu el niaj plej talentaj instruistoj. Instruisto, kiu ne kontentiĝas per la strikta prezento de la lernomaterialo; instruisto, kiun neniam formuloj kapablas kateni; instruisto, kies disĉiploj ne forlasas la movadon, sed restas fidelaj eĉ post jaroj, ĉar vivas en iliaj koroj kun flagranta flamo la sankta fajro, kiun ekbruligis ilia instruanto.



Laŭ desegnaĵo de St. Bartha.  
(ankaŭ havebla kiel poŝtkarto)

El ĉi tiu tre multflanka laboro rezultis, ke Baghy atingis ĉion atingeblan, kion tre malmultaj verkistoj atingas jam en sia vivo: li estas la plej populara homo en nia movado kaj liaj portretoj pendas tiom ofte en la klubejoj, kiom ofte nur tiuj de Zamenhof kaj pastro Cseh, kaj samtempe li atingis la plej altan oficialan rekonon, fariĝinte jam antaŭ jaroj membro de la Esperantista Akademio.

Se iu petus min, ke mi koncize klarigu al li, kio ja estas tiu Baghy-a filozofio, pri kiu oni povas legi tie kaj ĉi tie, en recenzoj, studoj, foje por, foje kontraŭ: ja mi ne povus alie respondi: la interna ideo. Jes ja, ĝi estas la esenca trajto de la homa kaj verkista sinteno de Baghy, ĝin li glorigas per sia por-Esperanta agado, ĝin li enportigas pere de siaj verkoj, kiuj humile, sed konscie portas sur si la devizon: « *Amo kreas pacon, paco konservas homecon, homeco estas plej alta idealismo* ». Jes ja, tiu ĉi filozofio eble ŝajnas tro idealista, tro malfirm-baza, por nia sange reala epoko, ja aŭdiĝis voĉoj kritikaj, kiuj esprimis sian dubon pri la aktualeco de tia filozofio, sed ni konfesu sincere, ĉu la Baghya filozofio kulpas? Aŭ eble la epoko?! Kaj ĉu ne ĝuste tia simpla elementa kredo, tia mondrigardo iom naiva, (ni ne timu la vorton; trafumas mian kapon la naiv-

eco de Sankta Johana en la Shaw-teatraĵo), estas eble tio, kio pleje mankas al nia generacio, tiel blinde rapidanta al la abismo?

La granda literaturhistoria signifo de la Baghy-verkaro konsistas en tio, ke per sia ekzisto ĝi pruvis la kapablecon de Esperanto por originala literaturo. Jes, estis ja antaŭ lia apero originalaj romanoj kaj originalaj versoj kaj estis unuopaj esperantistoj, kiuj ilin legis; kelkaj poemoj de Zamenhof kaj Grabowski iĝis jam komunaj trezoroj de la Esperantistaro, sed Baghy unue kapablis krei ĉirkaŭ si legantan publikon, jam ne plu unuopulojn, sed publikon en la vera senco de la vorto, legantojn, kiuj ne nur legis la libron, sed parolas pri ĝi, komentas ĝin; jes, Baghy alportis la novaĵon: la apero de Esperanta libro estas socia evento. Kaj li faris ankoraŭ plian miraklon: versoj ĝenerale ne estas vaste popularaj, krom la Zamenhof-poemoj, kiuj ja iĝis por la esperantistaro pli ol simplaj poemoj, akirinte la rangon kaj rolon de religiaj himnoj. Sed krom ili kaj eble kelkaj versoj de aliaj aŭtoroj, la esperantlingvaj poemoj ne vekis laŭtan resonadon. Nun venis la Baghy-poemoj kaj ilia dolĉa muziko, ilia facil-salta ritmado, ilia fortuskola impeto enfrapis sin en la orelojn kaj korojn de la esperanta publiko. De tiam la esperanta verso estas afero ne nur de la poetoj kaj recenzantoj.

Ankaŭ kiel satira prizisto li estas vojrompanto sur tiu ĉi tereno; li verkis lirajn ĉapitrojn en sia granda romano **Hura** kaj precipe estas mia korinfano la ruze mallerta, ĉarma figuro de Mihok, heroo de bonegaj Baghy-noveloj, kiu estas aparte sukcesa vivanta kreaĵo de Baghy, kvazaŭ vivanta persono el nia malgranda Esperanta mondo.

Nepridiskuteblaj estas la meritoj de Baghy, ĉirkaŭ la antaŭpreparo de la venonta esperanta dramo. Li mem verkis teatraĵojn; en ili kaj en tiuj de aliaj aŭtoroj li aktoritis kun granda sukceso; kaj kiel reĝisoro li faris miraklojn: el kelkaj bonvolaj, inteligentaj, sed neniel faksportaj amatoroj li ellogis tiel brilajn prezentadojn, ke, trankvile ni povas diri, li atingis la maksimumon, kion oni povas atingi. Kaj li semis grajnon, kiun la estonto rikoltos...

\*

Dr. med. ĉefkuracisto en hospitalo por infektaj malsanuloj, docento ĉe la budapeŝta Universitato, post la milito aktiva partoprenanto en la Esperantomovado, gvidinto de kursoj, ĉefredaktoro de Literatura Mondo en ambaŭ periodoj ĝis nun, verkanto de sinsekve

aperantaj libroj; jen la eksteraj datoj el la vivo de tiu granda Esperantisto kaj granda homo, kiun ni konas sub la nomo de **Kolomano Kalocsay**.

Per verstradukoj li komencis sian verkistan karieron kaj ankaŭ nun se la orelo de Esperantisto ekfrapas lia nomo, tuj venas en la kapon memorbildo pri iu el liaj majstraj traduklibroj. Kaj vere, la Kalocsay-tradukoj surhavas ian individue karakterizan stilon, kiu ne nur mankis en ĉiu tradukaĵo, aperinta antaŭ li, sed kiu levas liajn tradukojn alten super la ĝistiaman akiraĵon de la Esperanta literaturo. Kio estas la sekreto de liaj tradukoj? Bonajn tradukojn ni ja trovas antaŭ li, sed la ĉefa kaj plejparte la sola gajnaĵo de tiuj tradukoj estis la *forma solvo*. La lingvo ankoraŭ ne estis ellaborita kaj la tuta energio de la tradukanto elĉerpiĝis en la serĉo de forma solvo, por io plia ne plu restis forto. La esenca supereco de Kalocsay kuŝas tie, ke la perfektecon de la formo li levis tiel alten, ke la forma solvo por li ne plu estas problemo, do li havas energion por transplanti ankaŭ la humoron, individuan guston de la tradukota verko kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, koloroj. Jes, Kalocsay estas kreanta ĝaidenisto, kion li transplantas, tio enradikiĝas en la Esperanta humo kaj ekfloras je mirinda nova vivo, kelkfoje la nova vivo radias pli riĉan brilon ol la originalo. Vivanta voĉo parolas el tiuj ĉi libroj, nenie aŭdiĝas la raŭka knarsono de artefariteco, nenie tramalsekiĝas postsignoj de ŝvitado en laboro. Tre simpla estas la sekreto de tiu ĉi nova tradukarto. En la tradukita verso Esperanta la lingvo la unuan fojon ĉi tie vekigis je vivo. Tia eksterordinara rezulto ne povis resti sen vastefikaj sekvajoj. Kalocsay ne apartenas al la tipo de memcentra memrigardanta artisto, kiu eble naskas artverkojn, sed de kiu neniu povas lerni ion; ne, Kalocsay donis ne nur ekzemplon, li faris pli: li konsciigis en si mem sian labormetodon kaj cedis ĝin al komuna trezoro. Tio klarigas, ke lia tradukarto portis kun si ĝeneralan ekfloron de la Esperanta verstraduko: de tago al tago aperas novaj junaj talentoj; eldoniĝas Antologioj, kiuj en inda kvanto kaj artnivelo prezentas la poezion de iu nacia literaturo. Kaj ĉio ĉi ne estis imagebla antaŭ la eklaboro de tiu ĉi perfekta artisto kaj certmana edukanto.

La signifo de la originala poezio de Kalocsay kuŝas en tio, ke ĝi unue levis la Esperantan poemon egalranga al iu de la elitaj naciaj literaturoj. Unue ni sentis, ke la modesta rivereto de la Esperanta poezio kontaktiĝis kun la giganta fluo de la eŭropa liriko. Komence de la plej sekrete delikataj animvibradoj, de la plej embuskaj subkonsciaĵoj de la plej veluraj humornuancoj, de la plej petoleme ĉarmaj amoludoj ĝis la



Laŭ desegnaĵo de St. Bartha.  
(ankaŭ havebla kiel poŝtkarto)

tragika malheliĝo de mondproblemoj, ĝis la katastrofa kaosiĝo de individuaj kaj kolektivaj sortoj, ĝis la fine tamen venkespera volo de la homo de l' estonto: jen problemoj, sentoj, humoroj de moderna homo, kiuj en Esperanto unue eklaŭtis sur la bronzo sonanta de Kalocsay!

Erarus tiu, kiu pensus, ke la lingvisto estas ia aparta homo en Kalocsay. Ke la poeto kaj scienculo estas apartaj personoj. Ne, lia okupiĝo pri la lingvista flanko de la movado estas nur alproksimiĝo al la sama celo, el alia flanko. La celo, vivo de la lingvo kaj ĝia evoluigo al tia nivelo, ke ĝi estu kapabla esprimi ĉion, kion homa cerbo kaj koro diktas, jes, li celas fari la lingvon inda ilo por la homaro, strebanta alten. Li rekonis, ke por fari altnivelan literaturon, ne sufiĉas la deksex reguloj kaj la trunka vortaro de la fundamento: estas bezonataj nuancoj kaj en la vortoj (neologismoj) kaj en la sintakso. Humile kaj kun fera volo li sin ĵetis al studado de la ekzistanta lingvo-materialo, ĉefe al la verkoj de Zamenhof kaj la rezulton de sia laborego li transdonas al ni en la Plena Gramatiko kaj en siaj lingvistikaj artikoloj. Kaj al la leganto malkovriĝis tute nova mondo: neniam ankoraŭ aperis al ni Esperanto en formo tiel muskola, tiel vivoŝvela, kiel en la verkoj de la plej genia malkovranto de ĝiaj leĝoj.

La redaktora seĝo portis al Kalocsay multegan laboron, sed lia redaktoreco portis al la Esperanta literaturo multegan benon. Lia bonvola reviziado, liaj ĉiam modeste prezentitaj valoregaj konsiloj, helpis al multaj talentaj samideanoj; lia pasio al malkovro de novaj talentoj konatigis multajn novulojn al la publiko, lia fantazio riĉa je ideoj, lia nelacigebla instigemo al laboro jam naskigis multajn librojn, artikolojn... Kaj certe oni jam rimarkis, ke Kalocsay havas ian propran manieron de korektado: ankaŭ sur tiu ĉi tereno li sekvas la principon de neceso kaj sufiĉo, nome li korektas nur la nepre necesajn, sed

lasas validiĝi la individuan stilon de la korekto.

Multaj imagas Kalocsay'n kiel nuran literaturiston, kiun la movada parto de Esperanto ne multe interesas. Eraro! La movado interesas lin same, kiel la literaturo. Li rekonis, ke Esperanto nur helpe de sia literaturo povas ĝisatendi sian ĝeneraligon, ke la estonto de la lingvo baziĝas sur sia literaturo, tial li akcentas ĝian gravecon. Por li la literaturo ne estas io memcela, kiel ankaŭ la lingvo ne estas memcela: en lia mondkoncepto ambaŭ servas la venontan pli perfektan homon.

Ni deziru al niaj jubileantoj, ke la fruktopleajn dudek kvin jarojn sekvu ankoraŭ multaj-multaj jaroj plenaj de sano kaj sukcesa laboro. *L. Totsche.*

## Olimpiaj Ludoj kaj Universala Esperanto-Kongreso

En la nunaj tagoj okazas en du diversaj germanaj urbegoj du diversaj grandaj festoj: en Berlino, la ĉefurbo de la Germana Regno, la Olimpiado; en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, la Universala Esperanto-Kongreso.

Ambaŭ festoj estas klopodoj kunveni homojn el ĉiuj partoj de la mondo, por ke ili ekkonu unu la alian, por ke ili pli bone komprenu unu la alian.

Certe la Berlina festo estas la pli grandioza. Sed la Viena festo eble pli multe sukcesos en tio kio estas la vera celo de tiuj kunvenoj.

Jam la regnogermaĵoj gazetoj glosas pri la neebleco de interkompreniĝo. Beobachter-Hirschberg publikigas artikolon la 14an de Julio s.t. « 52 nacioj demandas pri la vojo al Regna Stadiono? Lingva kaoso ĉe Potsdamer Platz en Berlin ». Tie ni legas i.a.:

La Berlinaj policistoj staras kiel ondrompuloj en la marondado. Malhelhara rumano aliras kun deviga rideto la policanon: « Imi puteti spune drumul care duce la Stadion — Ĉu vi povas montri al mi la vojon al la Regna Stadiono? ». Ili interkonsentas. Apud ili sin pelas la eterne ruliĝantaj ondoj de l' ĉiutaga trafiko. « I wish to buy an umbrella. » « Ne komprenas; vi, najbaro, ĉu vi parolas france? » « Homo, tio ja estas angla, kompreneble! » Al la anglo: « What do you want, my dear? » « I wish to buy an umbrella. » « O, mon dieu, je suis malade! » « Sanitatos! » « Kion do? kion do? » « Bring em to den geneeskundigen dienst. Herkenningsteeken armbanden mit rood kruis op witten grond. » « Croix rouge! » « Red Cross! » « Kion do? kion do? Tio ja ne estas



# Aŭstralia Senatano proponas Internacian Konvencion pri tutmonda interkomprenilo.

POST DEKKVIN JAROJ ESTOS GENERACIO KIU TUJ SIN KOMPRENOS KIAM LA RADIO-APARATO FUNKCIOS, diras Senatano ABBOTT.

PETSKRIBO SENDOTA AL LA BRITA REĜO POR KUNVOKI LA NACIOJN.

« *The Northern Daily Leader* », ĵurnalo eldonata en Tamworth, N. S. W. (Nova Suda Kimrujo), Aŭstralio, de 22.5.1936, publikigis sub la superskribo « *Internacia lingvo — Kuniĝo de popoloj — La plano de Senatano Abbott* » la ĵenan artikolon:

Canberra, ĵaŭdon (21.5.1936).

Hodiaŭ, Senatano Abbott, dum parolado rilate al la « Supply Bill » (= leĝpropono pri monlivero; parolado farita en la Supra Ĉambro de la Federacia Parlamento. — Rim. de tradukinto), preparolis kaj rekomendis internacian lingvon, kiu servu kiel komuna rimedo por la interŝanĝo de pensoj kaj opinioj ĉe estontaj generacioj, tiel forigante la barojn, kiuj nuntempe apartigas la naciojn en la mondo.

Li sciigis, ke li intencas proponi internacian kunvenon, kie la nacioj konsentu pri taŭga kaj akceptebla internacia lingvo. Se la mondo akceptos komunan lingvon, oni atendos la tagon — post dekkvin aŭ dudek jaroj, laŭ Senatano Abbott — kiam nova generacio funkcigos la radio-aparaton kaj, pere de internaciaj dissendoj, komprenos la « vidpunkton de la aliulo ».

Tia lingvo, li asertis, ne nur okazigos

liberan interŝanĝon de penso kaj opinio inter nacioj, sed ĝi ankaŭ ebligos komunan tradukon de la mond-literaturo, kiu tiam povos esti legata kaj komprenata de ĉiuj. Ne gravas, kiu lingvo estos elektita, kvankam la angla lingvo, kiu estas la oficiala komprenigilo por 500.000.000 homoj, havas iujn evidentajn ŝancojn.

Senatano Duncan-Hughes diris, ke li tute konsentas kun Senatano Abbott. Laŭ lia opinio, komuna lingvo ne estas fantaziaĵo de revemaj teoriuloj. Li opinias, tamen, ke la ekstrema naciismo de aliaj nacioj malhelpos ke ili akceptu la anglan kiel internacian lingvon; kaj ke iu lingvo, neŭtrala por ĉiuj landoj, estu elektita.

Tradukis: R. Cleary

Leginte la raporton, nia samideano Reginald Cleary en Tamworth tuj skribis al Senatano Abbott, informante lin ke la lingvo, pri kiu li revas, jam ekzistas kaj funkcias dum duona jarcento. Li menciis mallonge la lastatempajn sukcesojn de Esperanto en teknika, scienca, pedagogia kaj aliaj sferoj; li priskribis ĝiajn literaturon, gazetaron, servojn en turismo, radio, komerco kaj korespondado.

R. F. Vaughan :

## EL BORNEO

En la unua duono de la 19-a jarcento vojaĝi sur la malajaj maroj estis danĝerege: piratoj tie svarmis, kaj fariĝis aĉe famaj.

*Piratoj!* Oni emas, aparte en la juneco, iom admiri la piratojn. Kia «splendida», romantika kariero, eĉ se ĝi finiĝus per pendigo!

Sed, supozante ĉi tiujn malajajn marbistojn romantikaj braveguloj, oni erarus. Malmulte ili riskis, atakis nur sub tre favoraj cirkonstancoj, estis facile fortimigeblaj per decida rezisto, kaj ofte, senkiale, kruelege buĉis, kripligis aŭ alie malbontraktis siajn kaptitojn; entute jen homaro malmulte admirinda. Fakte ili estis nur senskrupulaj mallaboremuloj, kiuj ne emis fari eĉ tiun

Post kelkaj tagoj li ricevis de la Senatano afablan leteron, kune kun presita broŝureto, kiun s-ro Abbott verkis pri internacia pensinterŝanĝilo. Ni publikigos ĉi-sekve la tradukon de la letero kaj ankaŭ de la broŝureto.

La fakto, ke la neceso de internacia lingvo nun okupas eĉ la atenton de membroj de la aŭstralia federacia parlamento, certe estas tre grava por nia movado. Kvankam Senatano Abbott pledas por mondhelpingvo nur tute ĝenerale, kaj ne por iu difinita lingvo, ekzemple Esperanto, tamen povas esti utile, pruvi al li la jaman disvastigitecon de nia lingvo. Ni tial konsilas al ĉiu esperantisto sur la vasta terrodo, direkti al Senatano Abbott, kaj ankaŭ al la alia Senatano menciita, s-ro Duncan-Hughes, simplan poŝtkarton kun mallonga gratul-teksto en Esperanto. Jen iliaj adresoj:

Senator Abbott, Parliament House, Canberra, Australia.

Senator Duncan-Hughes, Parliament House, Canberra, Australia.

Ankaŭ utilos, sendi al la nomitaj parlamentanoj Esperanto-gazetojn kaj prospektojn, faldfoliojn, afiŝojn ktp. kun Esperanto-teksto.

necesa. La vireto soifas. Nenio cetera. » Nun staras greko ĉe la policano: « Dynasthe na mi ipite tin agousan pros to Reichssportfeld? » ktp. ktp. Aŭdiĝas aliaj lingvoj: « Bana Rayh Jipor sahasininyolunu gōsterebilirmisiniz? » « Demodio demaslada machada de su alma. » « Molia, moje li da mi pokajete patia za Olimpiiskoto igrishte? » « Da lobo Maidan ta kuma lar si olympia. » « Voitekko neupoa minulle tien stationille? » « Ar butumite malonus parodzti kelia Reichssportfeld? » « Win dun chang lu Bahue dschang? » ktp ktp. La policano ĝuste meditas pri tiuj malfacilaĵoj, kiam konata sono penetras al lia orelo: « I wish to buy an umbrella ».

Ĉu necesa estas tiu tuta lingvobabelo? En nia treege klera tempo certe ne! Kaj ĝuste en tiu momente, kiam la lingvo-kaoso penetras oreltrafe kaj okulvide ĝis la ministerioj, la germanaj estraroj ĉesas toleri la Esperanto-organizaĵojn, — la nurajn kiuj povas alporti helpon en tiu kaoso.

malpezan laboradon, per kiu oni povas sin vivigi en tiu favorita regiono, kie la Naturo liveras ĉian primitivulan necesajn kontraŭ minimuma penado; prefere ili alprenis malmulte riskan rabadon, kaj facile oni komprenas kiel loga tia metio estus por tia popolo.

Longaj senokupecoj, sklavaj servistoj, — almenaŭ oni sukcesos havigi de la atakotoj sufiĉe da nutraĵoj kaj, atendeble, monon, varojn, juvelojn kaj gajkolorajn silkajn tukaĵojn; aldonu virinojn, la gajnon pro venditaj gesklavoj, liberan senĝenan vivadon kaj, kiel spicaĵon, la vojaĝadon, iom da batalado, facilajn venkojn. Jen plaĉega propono!

Facile estis per malpezaj, tre rapide velantaj boategoj (<sup>1</sup>) (aŭ per multaj sklavigitaj remantoj kiam vento ne favoras) ataki la malpli rapidajn azianajn komercŝipetojn, aŭ eĉ eŭropan, ne sufiĉe armitan, kiu pro senventeco senmoviĝis, aŭ surteriĝis ĉe tro malfrue rimarkita malprofundaĵo, kaj, plia logaĵo,

samtempe estos okazoj por havigi kapojn — homajn kapojn! Havigi homajn kapojn estas dezirindege, eĉ necese, ĉu por la komunumo, ĉu por si, ĉar homa kapo, eĉ de maljunulo, aŭ de virino aŭ infano, valoregas; ĝi bonŝancigas kaj honorigas, kaj cetere la virinoj neprigas ĝin por viro, kiu deziras edziĝi.

Ne mirinde tial, ke oni pli kaj pli alprenis ĉi tiun facilan, logegan metion, ke laste, ĉirkaŭ 1840, la pirateco fariĝis la ĉefa industrio de la malajaj marbordanoj, tiel ke, kvankam entreprenemuloj ankoraŭ riskadis (ĉiam, ĉie troviĝas la riskema, persistema komercisto) tre malpligrandiĝis la komercado inter la malajaj landoj kaj aliaj; oni trovis ĝin tro danĝera. Kanotegaroj vojaĝadis, serĉante taŭgajn viktimojn, ĉe sennombraj elirgajejoj oni observadis la maron, en sennombraj golfetoj kaj riveretoj oni atendadis, pretaj ekaperi kiel vespero. La maroj, kiuj kuŝis inter malaja insularo kaj la eksterlandaj merkatoj, koncernis plej parte al Britujo, sed Britujo estis tre okupita aliloke; la komercistoj plendadis, la piratoj povis daŭrigadi senpune. Laste, nur ĉirkaŭ 1845, la britoj serioze atentis ĉi tiun skandalon ĉe la sojlo mem de sia nova, rapide-graviĝanta centro ĉe Singapore, kaj agis.<sup>(2)</sup>

Kontraŭ decida atakado de kuraĝaj, bone-armitaj kontraŭuloj, la malajaj piratoj ne sin glorigis, la ŝanĝitaj cirkonstancoj ne konvenis ilin; plej senkuraĝigaj estis la vaporŝipoj, nova elpensitaĵo de tiu periodo, — primitivaj, pelataj per padeloradoj, sin helpantaj per veloj, tamen sendependaj pri vento aŭ tajdo. Longedaŭra rezistado estis atendebla kaj, ĉe popolo pli vere batalema, sendube estus okazinta, ĉar la piratoj estis multaj, loĝis larĝan regionon, kaj la sennombraj riveretoj de la vastaj malajaj marĉoj estus donintaj al ili sennombrajn rifuĝejojn, kien la vaporŝipoj ne povis alpenetri. Estus tre malfacile venki bravan, persisteman tian rabistaron. Sed, kontraŭe, spertinte, ke la bruego de siaj multaj kanonetoj neniel timigis ĉi tiun malamikon, kiu krude insistis alveni al mankontraŭmana batalado, la malajoj baldaŭ konvinkiĝis, ke la ludo ne valoras plu la kandelon, kaj baldaŭ reprenis sian antaŭan pacan vivadon de fiŝkaptisto, tiel montrante, ke la tiea pirateco ne rezultis de premaj cirkonstancoj, sed nur de senskrupula avideco.

Nature memoroj pri tiu « bona malnova tempo », tiu emo rabadi surmare, restadas, nur rigora administrado tiuflanke detenas la marbordanojn; oni ne kuraĝas ataki vaporŝipon, sed ŝipetoj ankoraŭ velas sur tiuj maroj, kaj ankoraŭ, de tempo al tempo, oni sciigas, ke (kompreneble plej ofte ĉe la insuletoj malproksimaj de la administraj centroj) iu fredulo tro libere vaginta, iu ŝipeto

kun loga ŝarĝo kaj malgranda anaro, tro tentinta, viktimiĝis.

De tempo al tempo oni sciigas pri iu individuo, kiu malprave supozis, ke tia agado ankoraŭ estas riskinda, ekzemple — Ali, loĝante ĉe Jolo (elparolu: « Holo »), urbeto sur la Filipina insulo Suluk (elparolu: « Sulu »), antaŭe fama pirata nesto. Ali nun atendadas en malliberujo, juĝota, kolerega kaj deklarante ke, se eble, li faros amok.<sup>(3)</sup>

Frue en ĉi tiu jaro Ali malsaĝe atentigis pri si; oni enketis, kaj evidentigis, ke antaŭ longe li alprenis la malnovan rabistan devizon: « Mallongan vivon, sed gajan! », ke de tempo al tempo li malaperis, ke neniam li sin dungis honeste. Kiacelaj estis tiuj misteraj forestoj? Sciigis, ke li kutimis vojaĝadi inter la insuletoj, kiuj ĉirkaŭe abundas, observante en izolaj lokoj jen butikon, jen la moviĝojn de iu aziana ŝipeto. La maro estas hejmo por tiaj insularoj, lertaj pri ĝi kaj pri boatoj; ili naĝas de la infaneco kiel fiŝoj. Agrabla vivo! Oni vagadas laŭvole, kun iom da rizo; oni scias, kie havigi trinkakvon sur la insuletoj; en la maro fiŝoj abundas; facile oni sin provizas per kokosoj, per bananoj; oni estas tre observemaj kaj atendas okazojn, — oni havas akran glavon kaj neniom da skrupuloj. Tio plaĉegis al Ali, kaj, ruzega, dum longe li sukcesis.

Kiom da fojoj li rabis? Kiom da fojoj li murdis? Pri tio oni ne scias, sed oni multe suspektas. Unufoje antaŭe oni ja juĝis kaj kondamnis lin, sed li sukcesis sen liberigi el la malliberejo kaj denove malaperis.

En februaro ĉijare Ali denove estis vagemaj kaj varbis naŭ kunulojn; oni forvelos, oni irados de insuleto al insuleto: honestaj vagantaj fiŝkaptistoj, kiujn volonte oni helpas kaj gastigos. Ali promesis agrablan vojaĝon, bonan rabajon kaj sendanĝeran forkuron; li gvidos ilin al butiko, izola, longe spionita, kies maljuna posedanto estas riĉa; Ali ĉion lerte aranĝos, kaj pri ĉio garantias. (Finota.)

(1) La famaj pirataj « praŭoj ».

(2) Vidu « La eŭropaj raĝoj de Sarawak » en Heroldo n-ro 747!

(3) Por la mahometanoj sinmortigo estas peko. Dezirante, do, fini sian vivon, oni plej ofte elektas fari « amok », tio estas sin armi kaj ataki ĉiun renkontitan personon, ĉu fremdulon, ĉu amatan parencon, kaj indiferente pri aĝo kaj sekso, ĝis kiam siavice oni estas mortigita.

### La ĉiutaga mensogo.

Barbisto: Tuj estos via vico!  
 Kelnero: Mi tuj alportos la kotleton.  
 La bona amikino: Via nova ĉapelo aspektigas vin ĉiela.  
 La dentkuracisto: Vi tute ne sentos doloron.  
 La bofilo al la bopatrino: Mi ĝojas vin vidi; revenu baldaŭ!  
 La ŝuisto: Viaj botoj certe estos pretaj hodiaŭ vespere!  
 La vendisto: Mi mem surhavas tiajn tolaĵojn.  
 La esperantisto: Vi finlernos ĝin en kelkaj semajnoj.  
 La kontraŭesperantisto: Tia artefaritaĵo neniam povos vivi.

### Modela servisto.

La kutime sendanĝera rivero Avon en Anglujo transbordiĝis kaj ĝia akvo atingis la bienadon de Lordo Allandale. La moŝta familio sidis ĝuste en la teoĉambro. Kiam la unuaj ondoj atingis la pordon de la ĉambro, la modela servisto malfermis, kun malsekaj jam piedoj kaj tremantaj genuoj, paŝante flanken, por fari lokon al la enpenetranta akvo, kaj anoncanta: « La Avon! ».

### Pri konstruado.

Mastro: Mi ne scias, kion fari pri tiu granda amaso da tero, kiun oni elfosis por pretigi la fundamentojn de la domo.

Servisto: Sinjoro, mi havas ideon: oni faru grandan fosajon kaj en ĝin enĵetu la teron.

Mastro: Sed kien ni metos la teron, kiun oni eligos el la fosajo?

Servisto: Oni faru la fosajon tiel granda, ke ĝi povu enteni la teron de la fosajo mem, kaj tiun elfositajn por pretigi la fundamentojn de via domo.

### Analogia konkludo.

Mi aĉetis 500 kovertojn kaj donis ilin al 12jara knabo por kontroli ilian nombron. Li komencas denombri sed baldaŭ ĉesas.

« Nu? »

« Ho! » li respondas. « Ĝis 100 eĉ unu ne mankis; tial mi supozas ke ankaŭ la ceteraj kvar centoj estas plennombraj. »

### Amo kaj laboro.

Junulo aspiras la amon de dorlotata, multe aspirata fraŭlino.

Lia patrino diris al li: « Vi devos multe labori, Adolaro, se vi volas akiri la fraŭlinon kiel vian edzinon. »

Lia patro aldonis: « Kaj eĉ multe pli vi devos labori, se vi estos akirinta ŝin. »

### La sala marakvo.

« Nu, Joĉjo, » demandas la instruisto, « ĉu vi povas diri al mi, kial la marakvo estas sala? »

« Certe pro la haringoj », respondas Joĉjo.

### La bongustulo

diras al la kelnero: « Hodiaŭ mi deziras ricevi ion, kion mi ĝis nun neniam havis »

« Bonege », respondas la kelnero, « hodiaŭ sur la manĝokarto estas indikita: cerbo. »

### Li ne bone vidas.

A.: Mi ne bone vidas hodiaŭ vespere, ĉar mi forgesis miajn novajn okulvitrojn. Diru al mi, kiu estas la supermezure ornamaĉita virino ĉe la fortepiano?

B.: Tio estas mia edzino.

A.: Ho, senkulpigiu min, kaj kiu estas la malbela fraŭlino, kiu staras apud ŝi?

B.: Tio estas mia filino.

A.: Ha, pardonu min, kaj kiu estas la naŭza homo kun la grandaj oreloj tie?

B.: Tio estas via bildo en la spegulo!

## Rido Sanigas

### Ankaŭ edziĝpropono.

Li: Fraŭlino, vi estas la vespera stelo.  
 Ŝi: Ho, vi estas la unua, kiu tion diras al mi.  
 Li: Ĉu vi do permesas, ke mi petu por tio la kutiman astronomian rekompencan?  
 Ŝi: Kion vi celas diri per tio?  
 Li: Ke mi havu la permeson, doni al la nove trovita stelo mian nomon!

# LA ESPERANTISTA REKLAMO

**Gefianĉigis** f-ino Wilh. F. M. Beukers, Ernst Casimierlaan 61, **Groningen**, kaj F. J. Belinfante, Banstraat 22, **Den Haag**, Nederlando. — Ni kore gratulas.

**Dum la XXVIII-a** Universala Kongreso de Esperanto en Wien proklamis prezidanto de U.E.A., s-ro generalo Bastien el Parizo ke dum la kongreso fianĉigis: F-ino E. Finkelkraut el Warszawa kaj S-ro R. Bloch, Praha-Smichov. 106.

**Morto.** Post trimonata grava malsano, la 21. 7.1936 mortis s-ino Zorka Mišak, edzino de nia samideano Stjepan Mišak en **Andana** (Turkujo). Si estis naskita la 24.12.1883 en Beograd (Jugoslavio). — Ni esprimas al s-ano Mišak nian koran kunsenton.

**Morto.** La 7.8.1936 mortis D-ro Pierre Corret, Paris, meritplena samideano kaj fervora pioniro de sendrata telegrafio, telefonio kaj radio. Li naskiĝis la 11.3.1881. — Ni esperas ricevi pli detalan nekrologon de la francaj samideanoj, kiuj perdis en li valoran kunbatalanton.

**LEO MOREAU, ARNHEM**  
ne plu loĝas: Esperanto-Domo, sed  
"Nia Hejmo", Velperweg 90c,  
**ARNHEM**, Nederlando.

**Funchal**, José Correia Coelho ŝanĝis sian adreson de Rua dos Arrifes, 26, je Rua 31 de Janeiro, 150. Li interŝanĝas poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn.

**La plej bela Nippon-pupo**, unu el japanaj belartaĵoj. Prezo 0,60 guldeno aŭ 5 resp.-kup. Tuj mendu ĉe T. Yosioka, Okada-kata, Toriityo, **Yokkai**, Japanujo. (353)

**Korespondado.** 19-jara svedino serĉas korespondantojn tutmonde. Gesamideanoj, skribu tuj al f-ino Märta Lilja, Bäckegravan, **Ramsberg**, Svedujo.

**Pola studento de Universitato** (Warszawa) kaj de Akademio por Eksterlanda Komercio volas korespondadi pri diversaj temoj, speciale el industria, komerca kaj ekonomia vivo kun esperantistoj (-inoj) de tuta mondo. Interesiĝas ankaŭ pri turismo, sendos tre interesajn kontraŭ poŝtkartojn ilustritaj. Zygmunt Orlos, **Jaroslav**, «Polmin», ul. Tatarska 12, Pollando.

**Elmigremadano**, 21-jara, deziras korespondi kaj interŝanĝi amatorajn fotografajojn. Li ŝatus ankaŭ ekstereŭropanojn. Nepre respondas. Erling Borggaard Larsen, **Sierslev** pr. Store-Heding, Danlando.

**La Esperanta Sekcio** de la Asocio por Instrua kaj Scienca Kinematografio tre bezonas adresojn de samfakuloj aŭ pretaj peri nian korespondon. Geesperantistoj! Ĉefa temo interesanta nin nuntempe estas: «Utiligo de kino en la altlernejoj». Ĉiu helpo estos rekompencata per literaturo. Adreso: Sovetio, **Leningrad 3**, Poŝtkesto 532, al Esperanta Sekcio.

**Verkisto** deziras korespondadi Esperante, angle, hispane aŭ germane kun verkistoj, instruistoj, scienculoj kaj aliaj pri evoluigo de biografia scienco kaj progresedukado. O. R. Faul, Hellerstr. 8, **Hirschberg/Riesenbergirge**, Germanujo.

**Mi deziras korespondi** pri esenco kaj naturkaraktero de Oispanio kaj Ĉeĥoslovakio; pri filozofio, literaturo aŭ Verdi'a muziko nur kun spritaj, belsentemaj personoj el ĉiuj landoj. A. E. Cortinas, **Fürth** (Bayern), Germanio, Friedrichstr. 7.

**Aŭstrikom** (Engelbert Neyer), **Schruns**, 40, Vorarlberg, Aŭstrujo, ŝtate koncesiita Esperanta eksport-komercejo, serĉas en ĉiuj landoj rilatojn al la komercistaro. Postulu niajn ofertojn laŭ dezirataj aŭstriaĵoj produktaĵoj!

**Ni serĉas aĉeti** aŭ havi pruntedone por Radiodissendo la jenajn gramofondiskojn, marko **Tri-Ergon**:

1. N-ro M554/517 parolado de D-ro Privat, kaj Zamenhof-parolado 1905.
2. N-ro 519/16 prologo de la XIX Kongreso en Danzig kaj Tri-Ergon inventaĵo. Ofertojn bonvolu sendi al: Svisa Esperanto Societo, Dufourstrasse 7, **St. Gallen**, O. Svislando. Ni pagos ĉiujn elspezojn kaj honorarion, se disko estos pruntedonita.

**Reprezentantoj de bone vendeblaj kurtenoj, puntaj kaj punt-artikloj serĉataj** en Norvegujo, Svedujo, Finnlando kaj Estonujo; korespondas Esperante, germane. Henriko Herdin, **Letovice 41**, Ĉeĥoslovakujo.

**Deziras korespondi** s-ro Hisaŝi Koike, ĉe Aicuki firmo, 1 ĉiome, Komagata, Asakusaku, **Tokio**, Japanujo, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

**Kiu sendos al mi** 100 bonajn eksterlandajn poŝtmarkojn, ricevos 100 poŝtmarkojn litovajn. J. Pušas, Paŝto dezute 190, **Kaunas**, Litovio.

**Poŝtmark-interŝanĝon** (nur Eŭropo) deziras s-ro H. Bobe, Wicodéstr. 3, **Dresden-Blasewitz**, Germanujo.

**Japana instruisto** de elementa lernejo petas al instruistoj interŝanĝi pentraĵojn kaj desegnaĵojn de lernejaj geknaboj 7-15 jaraj. — Adresu: N. Komaco, Teraŝoĝakko, **Kaminagon, Naganoken**, Japanujo.

**Mi aĉetas** aŭ interŝanĝas kvantojn da ordinaraĵ kaj jubileaj poŝtmarkoj el ĉiuj landoj. Adreso: Rufoloni, Via Etruria 44, **Roma**, Italio.

**Poŝtmarkaj kolektantoj!** Mi vendas kaj interŝanĝas bulgarajn kun fremdlandaj poŝtmarkoj. Nikola Iliev, «Zelenka» 12, v. **Tirново**, Bulgarujo. (361)

**Soalala, Madagascar** S-ro Robert Martin interŝanĝas poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj.

**Filatelistoj!** Se vi ŝatas esperantajn librojn vi povas ricevi ilin interŝanĝe kontraŭ poŝtmarkoj. Postula informoj de W. Le'owski, **Warszawa 1**, Skaytka Pocz 670, 1 lio.

**Juna usona instruistino** deziras korespondi poŝtkarte kun multaj gesamideanoj germanaj, ĉeĥaj, francaj kaj aliaj nordlandaj. F-ino Mary Beery, 215 N. Woodlawn, **Lima**, Ohio, U. S. A.

Mi estas 21-jara svedo. Skribu al mi! Erik Carlsson, Annedal Vallas, **Kinna**, Svedujo.

**Korespondado.** Sveda pacamiko kaj vegetarano deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj. S-ro Knut O. Lundström, Harrbacken, **Hakansö**, Svedujo.

S-ro Kizu-giitiro, **Itijoodori-joofukuji-Nisi, Kioto, Japanujo**; mi estas 26-jara oficisto, fervore deziras interŝanĝi p.m. kaj i.p.k. kun ĉiulandanoj. Certe respondos.

**A.E.L.A.** sciigas siajn membrojn, ke la libro «**Verkaro de FEZ**» estas ekspedita ĝis la la de aŭgusto al ĉiu aboninto, kiel kvina libro de serio C 1935. **Literatura Mondo**.

**W. R. Koopmans**, ŝtata oficisto kaj prezidanto de Esperanto-Propaganda Komitato, Leusderweg 215, **Amersfoort**, Nederlando, serĉas korespondantojn. Temoj: **Esperantomovado**; interŝanĝaĵoj: gazetoj, broŝuroj, stratkartoj.

**Urĝas.** Angla vidvo (soleca) serĉas Nederlandaninon, aŭ alian, 30-40 jaran, por prizorgi mastrumon en moderna domo. Tre komforta hejmo. lometa scio, aŭ emo lerni anglan lingvon estus avantaĝo. Ofertoj pri rekompenco ktp. tuj al G. Bury, «Montkresto», Breeze Hill, **Liverpool 20**, Anglujo.

**Internacia Katolika Informejo.** — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus**, sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, **Oss**, Nederlando. (310)

**Interŝanĝas poŝtmarkojn** kun ĉiuj landoj. W. Weimark, S. Stenbocksgat. 119, kaj E. Rasmussen, Kristinegat. 15, **Helsingborg**, — Svedujo.

S-ro B. Levy, 3 Novar Rd., Hyndland, **Glasgow**, Angl., 27-jara fraŭlo, volas korespondi kun la tuta mondo, letero aŭ poŝtkarto ilustrita. Certe respondos.

**Kiu samideano** havas lernilojn neuzatajn? Bonvolu sendi tiujn al mi, studemulo senstudila. Se necese mi rekompensas sendkostojn. S-ro Corn. Punter, **Ylst**, Nederlando.

**23-jara**, sveda junulo deziras korespondi kun eksterlandano pri diversaj temoj. Membro de I.O.G.T. Nils Andersson, **Varmsättra**, — Svedujo.

**Sambor, Polujo.** S-ro Jan Tyrka deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

**Inteligenta fraŭlino** serĉas iun ajn okupadon en eksterlando, prefere en sudaj landoj. Propojn bonvolu sendi en Esperanto, angla, germana aŭ franca lingvo al f-ino E.R., Esperantista Societo, Rŭa 76, **Pärnu**, Estonio.

**S-ro Gunnar Fahlander**, Fack 12, **Karböle**, Svedujo, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, L., pk., il..

## Korespondemulo !

Niaj membroj fervore deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj tra la mondo, kaj ni volonte kaj senpage enpripagos vian adreson en nian monatan gazeton «Amikoj de Esperanto», kiu estas eldonata ekskluzive por Esperanto-korespondantoj kaj libroamantoj. Sendu vian adreson senprokraste — hodiaŭ!

Abonkotizo por unu jaro: 1 svisa franko aŭ egalvaloro (sendu poŝtmandate).

Postula specimeno!  
Adreso: **AMIKOJ DE ESPERANTO**  
2 Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio, Japanujo.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S.  
Antverpeno — Belgujo.

